

ISSN 0023-3692

KAKTO

NUMERO 212 (2006:2)

Vudu-festivalo en Benino
Temo: bestaj rajtoj
KAKTO: Bosnio-Hercegovino,
la lando de la IJK!





Saluton!

Antaŭ iom da tempo mi konatiĝis kun virino, kiu laboris por *Green Peace*. Ŝia tasko estis kolekti kontribuojn en malriĉa kampara Georgio. Generale Georgio (aparte kampara Georgio), estas unu el la plej konservativaj ŝtatoj en Usono, kaj mia unua reago estis kompato al ŝi: "En tiu parto de la ŝtato verŝajne oni eĉ ne volas aŭskulti ion pri naturprotektado, ĉu?" Al mia miro, ĉio estis tute mala: ĝuste la *kamparaj ĉasemuloj*

estas inter la plej bonaj aŭskultantoj kaj kontribuantoj por *Green Peace* ol supozeble pli liberalaj urbanoj kaj antaŭurbanoj!

Kompreneble, ni, esperantistoj, estas por humana traktado de bestoj, kontraŭ kruelaj kaj nenecesaj perbestaj eksperimentoj, dolorigaj buĉpraktikoj ktp. – multaj esperantistoj pro tiu ĉi kialo rezignas manĝi viandojn kaj manĝi aŭ alimaniere uzi produktojn, faritajn per la uzo de bestoj. Sed per tio ĉi mi aludas al tio, ke la temo de bestaj rajtoj, ĉasado, vegetarismo ktp. estas tre ampleksa, multe pli ampleksa ol ĝi ŝajnas de la unua rigardo. Tiu ĉi numero de *KONTAKTO*, dediĉita al bestaj rajtoj, kompreneble, estas nur guto en la maro, kaj mi invitas vin legi pli en la interreto, libroj kaj naciaj revuoj, kaj formi vian propran opinion pri la afero.

Malfermas la numeron artikolo de Roĝer BORGES – konata al multaj esperantistoj kiel DJ Roĝer. Komence de 2006 li vizitis Beninon – la landon de vuduo – kaj volonte dividis siajn impresojn kun ĉiuj legantoj de *KONTAKTO*!

Sekvas ĝin enkonduko en bestajn rajtojn fare de Felix ZESCH (p. 5), kaj poste – artikolo de Pier Luigi CINQUANTINI kontraŭ "speciismo" en la traktado de bestoj (p. 6-7). Poste ni konatiĝos kun la historio de vegetarismo (p. 7) – artikolon pri ĝi preparis Oleg IZJUMENKO.

Ĉu vi scias, kio estas tutmonda birdokalkulado – kaj ke ukrainaj (odesaj) esperantistoj regule partoprenas en ĝi? Legu pli sur p. 8, en la artikolo de Tatjana AUDERSKAJA.

Granda parto de Saharo estiĝis pro paŝbestoj, kiuj formangis la plantojn, kiuj protektis ĝin – legu pli pri ekonomiaj sekvoj de bestobredado en la artikolo de Felix ZESCH (p. 13-14). Grashepataĵo, verŝajne, estas unu el la plej kruelaj bestoproduktaĵoj... Legu pli pri ĝi en la artikolo de Marco Trevisan HERRAZ (p. 14).

S-ro Etsuo MIYOSHI estas fama Esperanto-mecenato – kaj ankaŭ granda best-ŝatanto. Legu artikolon pri lia agado por pli bona mondo! Atendas vin ĉi-numere ankaŭ du malsamaj opinioj (de Diana SAKAJEVA kaj Joshua LANGFORD) kaj beletra rakonto, kiu bone kongruas kun la temo de tiu ĉi numero.

La mezaj kvar paĝoj de tiu ĉi numero estas ĉiujara aldonajo – KAKTO. Ĝi temas pri la lando de la ĉi-jara IJK – Bosnio-Hercegovino, kaj la temo de IJK 2006: multkultureco kaj tutmondiĝo. Legu pli pri tiu ĉi bela, antikva kaj fasci-

na lando, riĉa je historio kaj kulturo! La artikolojn por tiu speciala aldonajo verkis profesoro Branko MILJKO kaj profesoro kaj doktoro Zdenko LEŠIČ.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu ĉi numero, – kaj bonan legadon!

Ĝenja

P.S. Pro manko de kontribuoj, la dua numero de *TEJO Tutmonde* estos prokrastita kaj sendiĝos kun la tria numero de *KONTAKTO*.

<ENHAVO>

Benino: la lando de l' vuduo (Roĝer BORGES, Brazilo)	3-4
Enkonduko en bestajn rajtojn (Felix ZESCH, Germanio).....	5
Kelkaj vortoj pri vegetaranoj kaj veganoj (Russ WILLIAMS, Usono/Pollando)	5
"La gravajo estas ne ilia inteligento, kvarpedeco aŭ parolkapablo, sed ĉu ili povas suferi" (Pier Luigi CINQUANTINI, Italio).....	6-7
Historio de vegetarismo (trad. Oleg IZJUMENKO, Rusio)	7
Veganismo: pli ol dieto – vivstilo (Rogener PAVINSKI, Brazilo)	7
La tutmonda birdokalkulado (Tatjana AUDERSKAJA, Ukrainio).....	8
Bosnio: praa modelo por tutmondiĝo (Branko MILJKO, Bosnio-Hercegovino)	9-10
Beletro en la tempo de tutmondiĝo (Zdenko LEŠIČ)	10-11
Multkultureco en la tutmondiĝo (Branko MILJKO, Bosnio-Hercegovino)	12
La formangigata... planedo (Felix ZESCH, Germanio)	13-14
Grashepataĵo (Marco Trevisan HERRAZ, Italio/Hispanio)	14
Al la socio kun malmultaj bestoj-suferantoj (Etsuo MIYOSHI, Japanio).....	15
"Sed tiun paŝon devas fari vi!" (Diana SAKAJEVA, Rusio).....	15-16
"Vegetarismo kreos pli da senlaboraj agrikulturistoj en riĉaj landoj sen helpi al la malriĉaj" (Joshua LANGFORD, Usono).....	16
La alko (Eŭhen HUCALO, trad. D. CIBULEVSKI).....	17-19
Informe	19

Temoj de *KONTAKTO* en 2006

2006:3. Lingvoj.

2006:4. EGALAJ RAJTOJ/FEMINISMO, en kunlaboro kun la kampanjo ĈIUJ MALSAMAJ, ĈIUJ EGALAJ <<http://alldifferent-allequal.info/>> de Konsilio de Eŭropo. Limdato: 1-a de julio.

2006:5. TUTMONDIĜO. Limdato: 1-a de aŭgusto.

2006:6. AMO. Limdato: 1-a de oktobro.

Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj! Kontakto la redakcion laŭ la nova adreso: *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. Se vi sendis ion al la malnova adreso, ne timu, via letero ĉiukaze atingos la redakcion, simple kun ioma malfruo.

Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTE (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustrajoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 212** (2006:2), 43-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro, grafikisto:** Eugenia AMIS (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoro:** Joel AMIS (Usono). **Ĉef-korektisto:** Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio). **Presado:** SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel AMIS (Usono), Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio), Giancarlo BARALDI (Italio), Morteza MIRBAGHIAN (Irano), Paŭlo MOJAJEV (Ukrainio), SALIKO, (Finnlando), Behrouz SOROUSHIAN (Irano/Francio). **Facilingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj:** Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anonctoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponon por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj:** Reglono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio:* elsendoj:13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp>, <<http://start.at/retradio>>

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Benino: la lando de l' vuduo

Roger BORÊS, Brazilo

Antaŭ kelkaj jarcentoj la regno Dahomejo estis unu el la plej potencaj imperioj en okcidenta Afriko, kies landlimoj estis multoble pli vastaj ol la hodiaŭaj bordoj, streĉitaj inter Togolando kaj Niĝerio. Hodiaŭ, post la ĵusa marksista periodo (Benino estis komunisma dum 17 jaroj), la lando vige renaskiĝas, senhezite brakumante demokration. La baldaŭa balotado denove donas la fajron de espero al la popolo, kaj la estonteco ŝajnas brila.

La esperantistoj Roger BORÊS (Brazilo) kaj Olga CERVERA (Hispanio) vizitis tiun regionon komence de 2006 pere de Pasporta Servo, la gastiga reto de TEJO. Kun la senlaca helpo de François HOUNSOUNOU, reprezentanto de la junulara Esperantomovado en Afriko, ili travojaĝis la tutan landon, de la suda marbordo ĝis la landlimo kun Burkino. Tio estis mirinda, neforgesebla aventuro!

Benino, la naskiĝloko de vuduo, havas multegajn interesaĵojn, kiuj kaptis la atenton jam de la unuaj eŭropaj alvenintoj. Fiŝkaptistaj vilaĝoj konstruitaj sur fostoj en la suda parto de la lando estas inter la plej popularaj bildoj de Afriko kaj ege vizitindas. Norde la naturo abundas en grandaj naturrezervejoj. Tie loĝas la popolo *Somba*, kies kutimoj restas senŝanĝaj dum la lastaj 500 jaroj.

Tie ekzistas pli ol 30 triboj, kun siaj respektivaj malsimilaj lingvoj. Dank' al la fakto, ke ni vojaĝis kun lokanoj, eblis viziti ankaŭ forajn kamparajn vilaĝojn kaj konatiĝi kun diversaj etnaj grupoj, ĉefe la popolo *Fon*. Tio estus tro malfacila sen Esperanto, kaj ĝi ankoraŭfoje konfirmas la utilecon de la neŭtrala lingvo kaj ĝian kapablon laŭvorte "malfermi la pordojn".

Ekde radioj – ĝis vesper-taj flugiloj!

La vojaĝo komenciĝis en Cotonou, la ĉefa urbo de la lando, kvankam ĝi ne estas la oficiala ĉefurbo (la ĉefurbo

estas Porto Novo). Kun pli ol unu miliono da loĝantoj, Cotonou estas freza urbego, kun serioza media poluado, sed certe ankaŭ kun siaj ĉarmoj. Tie troviĝas la plej granda bazaro de la tuta lando – *Grand Marché du Dantokpa*. En ĝi troveblas kio ajn, ekde surstrataj manĝaĵoj, vestaĵoj, radio-aparatoj ĝis vespertaj flugiloj aŭ simiaj testikoj. Ni aŭdis tie pri iu kurioza aĵo nomata "*le fetiche de l'amour*" (la fetiĉo de amo). Prenu ĝin, flustru la nomon de la amata persono sepfoje, tuŝu la deziratan homon kaj li/ŝi estos via!

Sed eble la plej interesa loko estas la apuda vilaĝeto Ganvié, kie 30 mil homoj loĝas en bambuaj domoj super la akvo de la lago. Ni prenis boateton, kaj la gvidanto klarigis, ke en la 18-a jarcento la popolo *Tofinu* venis ĉi tien por eviti la bataladon inter la reĝoj de la popolo *Fon*. La lago estis la plej sekura loko pro la antikva tradicio, kiu malpermesis al la batalistoj eniri akvon. Hodiaŭ ĉiuj domoj staras du metrojn super la akvo – eĉ la telefonejo, poŝt-oficejo kaj bazlernejo. Homoj vivtenas



sin preskaŭ ekskluzive per fiŝkaptado; la plejmulto de la virinoj respondecas pri boata transporto kaj komerco. Ili fakte aldonas multe da koloro al la pejzaĝo per siaj fruktoj, spicoj kaj vestaĵoj.

Ni pluvojaĝis buse mil kilometrojn norden, ĝis la naturrezervejo *Parc National de la Pendjari*. Ĝi estas unu el la plej bonaj lokoj en okcidenta Afriko por vidi bestojn, kaj ni estis tre bonŝancaj. Ni vidis antilopojn, pavianojn, leonojn, hipopotamojn, elefantojn... Eĉ krokodilojn ni vidis! Ni ankaŭ konatiĝis kun la popolo *Betamaribé* (kutime nomata *Somba*). Ili koncentriĝas proksime al la urbeto Naititingou, sed loĝas meze de siaj agrikulturaj kampoj, apartigitaj unuj de la aliaj,



Infanoj kun Olga



François (maldekstre) kaj Roger



En Esperanto-centro en Benino

anstataŭ vivi kune en vilaĝetoj. Tiu tradicio montras ilian individuecon kaj helpis konservi ilian kulturon kontraŭ islamaj kaj kristanaj influoj. La plej granda parto de la *Betamaribé*-komunumo estas fervoraj animismanoj. Iam ili estis ĉiam nudaj, sed nuntempe ili uzas vestaĵojn. Ĉiukaze, ili daŭre ĉasas pere de pafarkoj. Tre interesa estas ilia tipa konstruaĵo *Tata Somba*. Ĝi konsistas el malgrandaj rondaj kabanaj, kiuj aspektas kiel etaj kasteloj. La suba etaĝo estas rezervita por bestoj; interetaĝe situas kuirujo. Supre estas teraso, kie troviĝas dormoĉambroj kaj grenejoj. Antaŭ ol reveni al la sudo de Benino, ni vizitis ankaŭ la akvofalojn *Kota* por freŝa banado meze de la naturo.

Festivalo de... vuduistoj!

Bedaŭrinde, François infektiĝis je malario kaj devis reveni hejmen por preni la medikamentojn. Do, mi kaj Olga haltis en la urbo Ouidah por la ĉiujara Festivalo de Vuduistoj, festata la 10-an de januaro. Vuduo, la tradicia religio de Benino, sekvas ĝeneralan formon, kiu devenas el Afriko. Laŭ tiu ĉi religio, ekzistas unu supera dio kun multaj aliaj malpli potencaj dioj aŭ spiritoj, kiuj apartenas kaj al la etna grupo, kaj al la spirita mondo de la antaŭuloj de la adepto. Kutime oni konsiliĝas kun la pastroj (*juju-*

homoj) pro ties kapablo komunikiĝi kun la spiritoj kaj trovi helpon. Tiu komunikado efektiviĝas per ritoj, kiu kutime inkluzivas oferadon aŭ donadon de palma vino, ĝino aŭ manĝaĵoj, kiel ovoj, kokinoj aŭ kaproj. La graco de la spiritoj estas esenca por protekto kaj prospero, kaj kelkaj spiritoj povas esti alvokataj por malbonaj, malicaj celoj.

Dum 300 jaroj la reĝoj de Dahomejo vendis kaptitajn malamikojn kiel sklavojn al eŭropanoj. Tiuj sklavoj estis sendataj ĉefe al la tiamaj kolonioj en Brazilo, Kubo kaj Haitio. Al la “nova mondo” la sklavoj portis ankaŭ sian religion, kiu disvolviĝis kaj estas aktive praktikata ĝis hodiaŭ. Originale, la vorto “*vodun*” signifis “kaŝita” aŭ “mistero”. La kredo evoluis kaj enkorpiĝis trajtojn de la rom-katolikismo, precipe pro la fakto, ke la sklavoj ne rajtis adori siajn proprajn diojn. La afrikamerika versio de vuduo estis distordita de la film-industrio kaj propagandita kiel la “nigra magio”.

La sklava vojo

En Ouidah ni piediris kvar kilometrojn portante niajn dorsosakojn tra la “*Route des Esclaves*”, la sama vojo, kie marŝis la sklavoj. En la fino, ĉe la marbordo, troviĝas la “Pordo sen Reveno”, memora monumento al tiu malhela pasinteco. Se oni fermas la okulojn, oni povas aŭdi la sonojn

de la ondoj, la bruon de la katenoj kaj eĉ la kriojn de malespero... Ĉi tie ni ĝuis la vudu-festivalon, dancante inter la homoj kaj la drumoj ĝis la nokto, nokto-fin’.

Post kelkaj tagoj, finfine ni atingis Lokossa-n, la hejmon de Esperanto en Afriko. La Movado forte kreskas, kaj eĉ la Afrika Oficejo de UEA estis plene translokita tien. La ĉefkialo por lerni la Internacian Lingvon estas korespondado. Kompreneble, la vizito de eksterlandanoj aldonas novan instigon al la studado de Esperanto. Roĝer prelegis en lernejo pri la rilatoj inter Benino kaj Brazilo – fakte, pli ol unu miliono da beninanoj estis senditaj kiel sklavoj al la tiama portugala kolonio. En la fino de la prelego oni parolis pri futbalo (neeviteble...), kaj estis donacita pilko kiel simbolo de amikeco inter BEF (Benina Esperanto-Federacio) kaj BEJO (Brazilo Esperantista Junulara Organizo).

Alia mondo vere eblas!

Finfine, ni iris al Abomejo, la malnova centro de la Granda Regno Dahomejo. La ĉefa vidindaĵo tie estas la riparata reĝa palaco kaj la elstara muzeo pri la imperia historio. Antaŭ la alveno de la francoj, ĉi tiu palaco estis la plej granda en la tuta okcidenta Afriko. Fakte, estis diversaj konstruaĵoj, ĉar ĉiu sekva reĝo, ekde 1645, konstruigis sian propran palacon. La rezulto estas admirinda: en la 19-a jarcento tie loĝis dek mil homoj, ne enkalkulante la haremon kun la 800 (!) edzinoj de la reganto. Bedaŭrinde, kiam la lasta reĝo, Béhanzin, antaŭvidis la evidentan malvenkon, li ekbruligis ĉion... Feliĉe, du palacoj konserviĝis, kaj tiu ĉi ejo estas deklarita kiel Monda Heredaĵo de UNESCO. En la muzeo estas konservataj multaj objektoj, inkluzive tronon de Ghézo, muntita sur la (realaj!) kranioj de kvar konkeritaj malamikoj.

Verdire, tio ĉi ne estis facila vojaĝo. Kun granda ekonomia krizo, minimumaj sanitaraj kondiĉoj kaj gravaj politikaj problemoj en la pli grandaj najbaraj landoj, Benino multe klopodas plibonigi sian situacion. Senarbarigo pro la industrio de koton, la ĉefa eksportaĵo, daŭre kaŭzas multegajn problemojn, kun preskaŭ plena detruo de la sudaj ĝangaloj. En la nordo, sekeco endanĝerigas la vivon de sovaĝaj bestoj kaj kaŭzas multajn dolorojn al la indiĝenaj popoloj. Ĉar manĝaĵoj ne estas sufiĉe variaj, nutrado estas nesufiĉa, kaj la infanoj suferas plej multe. Estas facile perdi la esperon, sed ne ĉio estas perdita.

Kion oni povas fari? La unua paŝo estas informiĝi. Legante ĵurnalojn, revuojn aŭ librojn, oni povas ekscii pri la ĝenerala panoramo. Eĉ pli bone estas vojaĝi: la vojaĝado permesas pli detale konatiĝi kun la mikroekonomia situacio – kaj ankaŭ la freneza korupto, je la kosto de la civitanoj. Ŝarĝita de tiuj scioj, oni povas ekzameni la agadon de niaj propraj registaroj kaj plendi al politikistoj, estante jam pli bone informitaj. La sekva paŝo estas reala kontribuo por la plibonigo de la afrikaj kondiĉoj, ĉu sur la nivelo de individuoj aŭ neregistaraj organizoj. Eĉ se la statistikoj pri la Nigra Kontinento donas la impreson, ke la problemoj estas nesolveblaj, la realo estas, ke alia mondo vere eblas. La mirinda laboro de la Esperanto-instruistoj HOUNSOUNOU kaj LATIFOU simple montras al ni ke, paŝon post paŝo, iom post iom, ja eblas plibonigi la grandan bildon. Espereble, kiam ĉiuj ni prenos la respondecon, tiu malfacila tasko estos finfine plenumita.

Reviziis James PITON, Brazilo
Fotoj: Olga CERVERA, Hispanio (inkluzive la kovrilajn fotojn)
Gvidado: François HOUNSOUNOU, Benino

Enkonduko en bestajn rajtojn

Felix ZESCH, Germanio

Se ni legas la vortojn “bestaj rajtoj”, ni unue pensas pri la vorta simileco al “homaj rajtoj”. Kaj kiam temas pri homaj rajtoj, ni eble pensas pri la deklaro de homaj rajtoj de 1948. Esence homaj rajtoj estas rajtoj, kiujn homoj havu laŭ la ĝenerala hodiaŭa opinio. Multaj homoj opinias, ke bestaj rajtoj estas aldona luksaĵo al homaj rajtoj. Tamen, jam la vortoj “homaj rajtoj” enhavas diskriminacion laŭ la specio “homo”, dum bestaj rajtoj inkluzivas ankaŭ homojn, ĉar homo ja fakte estas nur simia specio – tre sukcesa, tamen, laŭ certaj vidpunktoj. Ĉar plantoj supozeble ne povas konscie suferi kaj plantaj rajtoj en etika evoluo venas nur post bestaj rajtoj, ni en tiu ĉi eldono ne konsideras ilin.

Malantaŭ ĉiu rajto estas etiko. Unue venas la etiko, poste, konklude el tio, venas la rajto. Rajtoj, tamen, ne estas anstataŭo por nia etika sistemo, pli vere ili estas nur fadeno por orientiĝo kaj malhelpilo kontraŭ pura barbareco. La jura sistemo, kiun ni difinas, estas nur minimuma etika sistemo, laŭ kiu ni agu. Tamen estas multaj agoj, kiuj laŭlitere estas tute laŭleĝaj, sed tamen laŭ iu etiko ege malbonaj. Ekzemple, dolorigo kaj suferigo de bestoj nur por ies plezuro estas ofte konsiderataj malbonaj, tamen en multaj landoj ili

ne estas kontraŭleĝaj. Etiko do kutime estas pli ampleksa ol jura sistemo. Nura etiko ne helpas vere sociskale sen universalaj rajtoj, kiuj ĝin realigas. Ankaŭ inverse – universalaj rajtoj sen etika fono estas malplenaj kaj neklarigeblaj. En individua nivelo, tamen, ĉiu havas en ioma grado la eblecon agi laŭ sia propra etiko, kiam ĝi ne tro kontraŭas la regantan juran sistemon. Oni ne devas atendi ĝis kiam venas tiutema leĝo.

La senco malantaŭ homaj rajtoj estas ebligi al ĉiu homo vivon, kiu supozeble plej bone konformiĝas al liaj interesoj, sen tro ĝeni la aliajn. Ni povas supozi, ke ĉiu homo volas mem decidi ĉu vivi aŭ ne; ke homoj volas havi almenaŭ la rajton libere kuniĝi; ke virinoj volas havi similajn rajtojn kiel viroj ktp. Kiam temas pri bestaj rajtoj, ni povas pensi simile. Ni povas supozi, ke bestoj ne ŝatas esti uzataj en industriaj bredejoj, buĉataj, suferigataj ktp. Ekzistas multaj aliroj al bestaj rajtoj. Sed ĉefe temas pri la esencaj rajtoj pri vivo kaj libereco, kaj ne pri iu rajto voĉdoni.

Ĝenerale konstateblas en la homara historio evoluo al pli bona kaj etika agado. Antaŭ kelkaj jarcentoj vortoj kiel “virinaj rajtoj” aŭ “infanaj rajtoj” estis priskribo de utopio. Tamen la ĝenerale akceptita etiko evoluis, kaj hodiaŭ tiuj rajtoj



(almenaŭ surpapere) en multaj landoj estas akceptitaj. Por krei sistemon de “bestaj rajtoj” oni bezonus similan evoluon de la etiko. Kaj aldone kutime oni postulas, ke la etiko devas esti senkontraŭdira. Sed ĉu ne ekzistas kontraŭdiroj ankaŭ en homa etiko?

Pli gravas fari ion, ol atendi perfektecon

Imagu: trajno, kiu ne povas bremsi, veturas al tunelo. En la tunelo laboras kvin laboristoj, kiuj neeviteble mortos, se nenio okazos. Sola uzebla ilo estas trakforko, kiu veturigis la trajnon en alian tunelon, kie laboras nur unu laboristo, kiu tiukaze mortus. Ĉu vi funkciigus la trakforkon? Imagu nun, ke vi estas kuracisto. Ĉe vi kuŝas kvin malsanuloj, kiuj bezonas diversajn korporganojn. Se ili ne ricevas ilin, ili mortos post horo. Envenas sana homo, kiu havas ĉiujn bezonatajn organojn por

supervivigi la malsanulojn. Ĉu vi mortigus lin, por disdoni liajn organojn al la malsanuloj? Esence, la situacioj estas similaj, tamen kutime ni reagas tute malsame en tiuj du situacioj.

En ĉiu etika sistemo oni povas trovi kontraŭdirojn, kiuj sensencigus la tuton. Se ni en la kampo de homaj rajtoj jam havas etikan kontraŭdirojn, kaj tamen volas homajn rajtojn, ni ankaŭ povus simile agi pri bestaj rajtoj, kaj akcepti eblajn kontraŭdirojn. Pli gravas fari ion, ol atendi perfektecon.

Malantaŭ ĉiu provo de besta etiko estas la esenca demando “Kiel rilatu la homo al bestoj?” Por helpi pensi sendiskriminacie oni povus parenteze demandi sin “Ĉu mi same rilatus al ĝi, se ĝi estus homo? Kial?” La artikoloj en tiu ĉi numero celas pliklarigi la problemojn de la hodiaŭa reganta etika sistemo kaj instigi al pensado.

Kelkaj vortoj pri vegetaranoj kaj veganoj

Russ WILLIAMS, Usono/Pollando

Fojfoje aperas terminaj demandoj pri la ĝusta uzado de la vortoj “vegetarismo” kaj “veganismo”. Ekzemple, oni fojfoje renkontas “vegetaranismo”, verŝajne pro konfuzo kun nacilingva termino (ekz., “vegetarianism” en la angla). Ĉiuj miaj vortaroj* (krom unu malbona poŝvortareto) enhavas “vegetarismo” kaj ne “vegetaranismo”. Serĉo per google.com prezentas pli-malpli 97 mil uzojn de “vegetarismo” kaj nur 1,3 mil de “vegetaranismo”.

Laŭ la reguloj de Esperanto, “vegetarismo” ja ŝajnas pli taŭga, ĉar la afikson “-ismo” oni aldonas al radiko por signifi doktrinon aŭ sistemon rilate al la temo. Ekzemple, “spiritismo”, “budhismo”, “marksismo” ktp.

Problemo estas, ke Esperanto havas la vorton “Kristanismo” anstataŭ “Kristismo”, kio konfuzas aferojn**.

Konfuzas ankaŭ la termino “veganismo”, kiu sugestas ke oni simile uzu sufikson “an” ankaŭ en “vegetaranismo”. Tamen, “vegano” estas stranga vorto, ĉar ja ne temas pri ano de vego (kiu estas sporta trako, aŭ la stelo Vego). Verŝajne, ĝi devenas de la angla “vegan” kiu estas kaj adjektivo (por priskribi la dieton) kaj substantivo (homo, kiu manĝas laŭ tia dieto).

Multaj esperantistoj ja uzas la vorton “vegano”, sed tiu vorto ne aperas en PIV – ĝi mencias nur “vegetalismo” kaj “vegetariismo” kiel vortojn kun tiu signifo, ke oni manĝas nek viandon nek laktaĵojn nek ovojn nek aliajn bestodeven-

ajn manĝaĵojn. Verŝajne “vegano” estas pli rekonata vorto ol “vegetalano” kaj “vegetafano”, supozeble ĉar la angla vorto “vegan” estas sufiĉe konata inter tiel-maĝantaj homoj internacie.

Mi demandis al kelkaj alilingvanoj (dankon al ili!): Marc BAVANT trovis “vegetarismo” kaj ne “vegetaranismo” en franca-Esperanta vortaro, kaj nenion pri veganismo/vegetariismo/vegetalismo. Gunnar FISCHER same trovis “vegetarismo” kaj ne “vegetaranismo” en du germanaj E-vortaroj (de KRAUSE), sed li raportas, ke vegetalismo = vegetarismo, laŭ KRAUSE. Verŝajne, la terminaro pri “veganismo” malpli stabilas ol tiu pri vegetarismo, ĉar vegetarismo estis videbla en Esperantio dum pli longa tempo.

luj proponas diferencon inter vegetalismo kaj veganismo: laŭ tiu propono (menciita de Rogener

PAVINSKI kaj Nori en *yahogroup*-diskutlisto Esperantistaj Vegetaranoj, vegetalismo temas nur pri dieto, kiu evitas viandon, laktaĵojn, ovon ktp., kaj veganismo, plue, evitas ankaŭ aliajn bestajn produktojn (ledo ktp.) kaj pli zorgas pri bestaj rajtoj, ne nur pri dieto por persona sano.

Konklude, ŝajnas sufiĉe evidente ke oni uzu “vegetarismo” anstataŭ “vegetaranismo”, kaj ne klaras pri “veganismo”, “vegetalismo”, “vegetariismo” ktp.

* Mi kontrolis en PIV (2002 kaj la antaŭaj) kaj en ok aliaj anglaj kaj polaj Esperantaj vortaroj. Krome, PMEG aprobas “vegetarismo” en la diskuto pri “ism” – Aŭt.

** Laŭ PMEG, la “an” en Kristanismo superfluas, kaj temas pri nacilingva influo. Ni lasu pluan diskuton pri la misteraj subtilaĵoj de “an” kaj “ism” al aliaj pli lertaj homoj! – Aŭt.

“La gravaĵo estas ne ilia inteligento, kvarpiedeco aŭ parolkapablo, sed ĉu ili povas suferi”

Pier Luigi CINQUANTINI, *Italia*

La bestoj ne estas tiel stultaj kiel oni pensas pri ili kutime

MOLIÈRE, *Amfitriono*

Plantoj – por bestoj, bestoj por... homo?

Ekde la komenco de la t.n. civilizacio, oni neniam konsideris la bestojn kiel estaĵojn indajn je respekto kaj rajtoj (almenaŭ laŭ la okcidenta pensmaniero). Jam en la Biblio oni parolas pri homo kreita laŭ Dia aspekto, por ke li regu super la teraj estaĵoj: “...kaj Dio diris al ili: *Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj kiuj moviĝas sur la tero*” [Genezo, 1, 24-28].

Jen unu el la originoj de la okcidenta penso. La dua devenas de la greka tradicio – en tiu tradicio la plej grava fondinto de nia nuna pensmaniero estis Aristotelo. Li asertis, ke la naturo estas hierarkio, kie raciaj estaĵoj estas faritaj por tiuj kun pli grandaj raciaj kapabloj: “*La plantoj estas faritaj por la bestoj kaj la bestoj por la homo, la hejmaj – por ke li utiligu kaj manĝu ilin, la sovaĝaj, se ne ĉiuj, do almenaŭ la plej granda parto, por ke li manĝu kaj utiligu ilin por aliaj necesoj, por vestoj kaj aliaj iloj*” [Politiko, I, (A), 8.].

Dum la jarcentoj, la ĉefa ideo pri la rilatoj inter homoj kaj bestoj restis, kun kelkaj esceptoj (Sankta Francisko el Assisi, Leonardo da VINCI, Michel de MONTAIGNE, k.a.), tiu de Aristotelo, kun kelkaj negativaj ekstremaĵoj, kiel tiu de Kartezio, kiu detruis la bildon de la bestoj kiel estaĵoj, kapablaj senti.

Ĝis la 18-a jarcento, tamen, neniu filozofo en siaj teorioj

traktis bestojn kiel estaĵojn indajn je ajna konsidero. Tra jarcentoj, filozofoj de diversaj skoloj ĉiam haltis antaŭ la problemo de nehomaj estaĵoj, ignorante ilin aŭ donante al ili nur kelkajn liniojn, kiel faris KANT: “*Koncerne la bestojn, ni havas nenian rektan devon al ili. La bestoj ne havas*



memkonscion kaj do ili estas nenio alia ol rimedoj fronte de celo; tiu celo estas la homo” [Etikaj lecionoj].

Lumeto en tenebroj

Sed en la sama epoko de KANT ekestis ankaŭ lumeto en la **tenebroj**. Utilisma filozofo, Jeremy BENTHAM, trafis la veran esencon de nia problemo. En sia verko *Introduction to the principles of morals and legislation* (Enkonduko al la

principoj de la moraloj kaj leĝaroj) li diras: “*Eble iam venos la tago, kiam la cetero de la bestaj estaĵoj povos akiri tiujn rajtojn, kiuj neniam estis neitaj al ili, se ne fare de la tiraneco. La francoj jam malkovris, ke la haŭtkoloro ne estas kialo, pro kiu homa estaĵo estu forlasita al la*

unusemajna, aŭ eĉ unumonata. Sed eĉ konsentite ke ne tiel estus, kio gravus? La problemo estas ne “ĉu ili povas rezoni?”, nek “ĉu ili povas paroli?”, sed “ĉu ili povas suferi?””

Speciismo = rasismo

Post li, eĉ malgraŭ la publikigo de “*La origino de la specioj*” de Ĉ. DARWIN, kiu definitive forigis la ideon ke la homo estas fremda al la bestoj, la situacio ne multe ŝanĝiĝis – escepte de kelkaj izolitaj voĉoj, kiuj komencis, ĉefe en Britio, proponi laŭleĝigi... pli homajn kondiĉojn por la bestoj.

Tio daŭris ĝis 1975, kiam aperis revolucia verko *Animal Liberation* (Bestliberigo), fare de Peter SINGER, profesoro pri filozofio kaj direktoro de la Centro de Homa Bioetiko en la universitato *Monaŝ* en Melburno. Tiu eseo, kiu poste fariĝis biblio de la plej ekstrema ekologiismo (vegetara, cela al besta liberigo), finfine malfermis la debaton pri tiu problemo, ĝis tiam tiel neglektata. SINGER komencas la argumentadon per la konsideroj de BENTHAM: “*La gravaĵo estas ne ilia inteligento, kvarpiedeco aŭ parolkapablo, sed ĉu ili povas suferi*”.

Do, por streki la disigan linion inter ni kaj la aliaj bestoj, oni ne povas elekti inteligentcon, kapablon paroli aŭ alian econ, ĉar tiel ni ne povas certi, ke ĉiuj homoj estus maltrankvilaj tiu linio: beboj, cerbohandikapitoj aŭ cerbodamaĝitoj certe estas malpli inteligentaj ol multaj bestoj... Se oni elektus kiel baron la aspekton, oni kulpus pri ia tipo de rasismo: la speciismo, kiu ne estas malpli grava. Fakte la rasistoj, kiam ili ne plu havas argumentojn por pruvi la superecon de sia raso super la alia, enkondukas

ĝuste tiun ĉi argumenton: raso. Same la speciisto: kiam oni ne plu povas subteni la superecon de ĉiu membro de sia specio, oni antaŭmetas la aspekton. Do: speciismo = rasismo. La disiga linio tiel povas esti nur la povo suferi. Ĉiuj estaĵoj kun tia eco povas havi rajtojn, dum aliaj ne – sed oni ja konsideru ĉi-lastajn rilate al la signifo en la vivo

de estaĵoj, kapablaj suferi.

La enmetado de aliaj bestoj en “nian” cirklon ne signifas ke ni devas doni al ili la samajn rajtojn, kiujn ni mem havas. Oni devas konduki laŭ la principo de egala konsidero de la interesoj. Bestoj certe ne havas intereson, ekzemple, al la rajto voĉdoni, sed jes ja ili havas la rajton ne suferi. Do, oni devas egale konsideri

homan kaj bestan suferojn. Tio, kompreneble, ne signifas, ke morto de besto havas la saman valoron kiel morto de homo, kiu kapablas plani sian estontecon, rilati kun familianoj, geamikoj, konscii pri sia ekzisto. Sed same oni pretu akcepti ke ankaŭ la vivo de cerbohandikapito aŭ cerbodamaĝitoj ne estas samvalora al la vivo de homo kun sana

cerbo. Per tio ĉi mi celas netion, ke oni konduki al la cerbohandikapitoj same kiel oni faris ĝis nun al bestoj, sed oni ne daŭre suferigu bestojn...

tenebro – profunda mallumo

vilo – densa aro da mallongaj kru-daj haroj (felo)

kokcigo – ostoj finanta la spinon de homoj kaj homsimilaj simioj

Historio de vegetarismo

“Kiu semas murdon kaj doloron, ne povas rikolti ĝojon kaj amon”

Vegetarismo estis kutima por la hinda subkontinento ekde eble la dua jarmilo antaŭ Kristo – pro spirita kialoj, kiel ahimso (senperforto) kaj por malgrandigi malbonan karmon. Hinduismo instruas, ke ĝi estas perfekta dieto por spirita evoluo. Same pri ĝainismo, la “antaŭulo” de budhismo: ĉiuj ĝiaj adeptoj (inter ok kaj dek milionoj) estas vegetaranoj. Ankaŭ budhismaj monaĥoj de la mahajana skolo historie praktikis vegetarismon.

Multaj antikvaj hindaj tekstoj antaŭenigas vegetarismon. Sekulara verko *Tirukural* antaŭ pli ol du mil jaroj proklamis: “Sentemaj animoj, kiuj forlasis la pasion, ne manĝos karnon lasitan de la vivo. Kiel oni povas praktiki veran kompaton, se oni manĝas karnon de besto por grasigi sian propran karnon?”

Vegetaranoj en Eŭropo estis nomataj “pitagoranoj” pro la filozofo Pitagoro kaj liaj adeptoj, kiuj rifuzis manĝi viandon en la sesa jarcento antaŭ Kristo. Tiuj homoj praktikis vegetaran dieton pro sanaj kaj etikaj kialoj. Laŭ la romia poeto Ovido, Pitagoro diris: “Dum Homo daŭre restas senkompata detruanto de malpli altaj vivaj estaĵoj, neniam li konos sanon aŭ

pacon. Tiel longe, kiel homoj masakros bestojn, ili mortigos unu la alian. Ja, tiu, kiu semas murdon kaj doloron, ne povas rikolti ĝojon kaj amon”.

En la jaro 1847 la unua Vegetara Socio en Ramsgate [ramsgejt], Anglio, konsentis, ke “vegetarano” – de la latina vorto *vegetus* (“vive”) kaj simila al la angla vorto *vegetable* (“legomo”) – estas persono, kiu rifuzas konsumi ajnan karnon.

Adventistoj de la Sepa Tago kaj kredantoj de Rastafarianismo* – religioj fonditaj en la 19-a kaj 20-a jarcentoj – ankaŭ ofte estas vegetaranoj. Afrikaj hebreaj izraelidoj manĝas nur laŭ la organika vegetara dieto, kiu respektive ekskludas laktaĵojn.

Kredantoj de la Siĥa religio – unudia religio fondita en la 16-a jarcento en Hindio – estas dividitaj pri la demando, ĉu ilia religio malaprobas manĝadon de viando aŭ ne.

En la okcidenta mondo populareco de vegetarismo stabile kreskis dum la 20-a jarcento kiel rezulto de sanaj, etikaj kaj (pli antaŭnelonge) ekologiaj zorgoj. En 2000 en Usono 2,5-3% de la loĝantaro diris, ke ili neniam manĝas viandon, kio povas signifi ke ili estas vegetaranoj, kaj 5-6% diris, ke ili ne manĝas viandon. Tio



Pitagoro

montras kreskon kompare al la pasinta jardeko kaj grandan kreskon kompare al la jaro 1950, kiam vegetarismo estis tre malofta. Tamen, popersona viandkonsumo en Usono signife kreskis ekde tiam, ĉar la prezo de viando malkreskis pro industria agrikulturo kaj la averaĝa enspezo kreskis.

Preparis Oleg IZJUMENKO, laŭ materialo el Vikipedio, la libera enciklopedio – www.wikipedia.org

* Rastafarianismo – ne N.PIV-a vorto, detala artikolo pri ĝi troviĝas en E-wikipedio

Veganismo: pli ol dieto – vivstilo

Rogener PAVINSKI, Brazilo

Veganismo estas ofte konata kiel pura aŭ radikala vegetarismo. Rilate al dieto tio signifas forigi, krom ajnan viandon, ankoraŭ ovojn, lakton kaj mielon. Veganaj ne uzas ledon, lanon kaj evitas aĉeti kaj uzi produktojn, kiuj

enhavas bestajn devenaĵojn aŭ por kies produktado kaj testado estis uzataj bestoj.

Veganismo baziĝas sur la ideo, ke ĉiuj bestoj – homaj kaj nehomaj – rajtas vivi sen suferi kruelecon de homoj, kaj ke ne ekzistas pravigo klasifiki kelkajn speciojn kiel malsuperajn. Tion

la modernaj filozofoj nomas “speciismo” (pli detale legu pri ĝi sur p. 6 de tiu ĉi numero). Veganaj ne estu konfuzataj kun simplaj bestamantoj – veganaj estas homoj, konsciaj pri la bestaj rajtoj, kiuj agas ĉiutage, savante bestojn kontraŭ senkiala krueleco.

Estas ofta konfuzo kon-

cerne la vorton “vegano”. Oni asertas, ke en Esperanto jam ekzistas vorto “vegetalismo” por priskribi tiujn manĝkutimojn. Sed fakte, veganismo estas filozofio, vivstilo, kiu ja enhavas ankaŭ manĝkutimojn – sed aldone al tio veganaj strebas kontraŭstari ĉian bestan ekspluatadon.

La tutmonda birdokalkulado

Tatjana AUDERSKAJA, Ukrainio

En januaro miloj da homoj en la tuta mondo eliras el siaj domoj kaj el urboj, kaj pasigas almenaŭ unu aŭ du tagojn en la naturo, observante birdojn kaj ĝuante rekuniĝon kun arbaroj, riveroj, marĉoj... Tiuj homoj faras utilan laboron, – tamen, ili ne estas fakuloj kaj ne ricevas pro tio pagon. Ilia “pago” estas ĝuo pro la kuniĝo kun la naturo kaj memestima sento, ĉar ili kunlaboras por grava internacia programo. Ili partoprenas la Tutmondan Birdokalkuladon.

La aranĝo estas sufiĉe simpla: oni kalkulas ekviditajn birdojn sur la lokoj de ilia vintro. Faras tion simplaj natur-amantoj, sub la gvido de bone ellaborita norma metodo, kun profesiula kontrolo. Se fari la normigitajn kalkulojn ĉiujare sur la sama loko, oni ekscias pri la long-daŭraj emoj en disvolviĝo de apartaj birdaroj.

En la 1990-aj jaroj en la Tutmondaj Birdokalkuladoj partoprenis pli ol 100 landoj, kaj oni kalkulis ĉirkaŭ 30 milionojn da birdoj. Ĝenerale, la historio de la Internaciaj Birdokalkuladoj komenciĝis en 1967, kiam IWRB (*International Waterfowl Research Bureau* – Internacia Esplorburoo pri Akvaj Birdoj) ekigis ĉiujarajn Birdokalkuladojn en Eŭropo; nun en ili partoprenas 50 landoj, kaj oni kalkulas ĉ. 25 milionojn da birdoj.

En 1987 tiaj kalkuladoj okazis en Azio, inter 20 landoj kaj kvin milionoj da kalkulitaj birdoj; en 1991 – en 30 landoj de Afriko, kun kvin milionoj da kalkulitaj birdoj, kaj en kelkaj landoj de Suda Ameriko. Norda Ameriko aliĝis al la kalkulado nur en 2001.



Do, nun la tuta mondo estas kovrita de la aro da birdokalkulantoj. Sed kial oni bezonas tiujn kalkulojn? Respondoj estas multaj:


1. Ili estas la bazo por prijuĝi la grandecon de apartaj birdaroj.

2. Ili sciigas la informojn pri multaj malgrandaj populacioj, kiuj ne ĉiam estas atingeblaj aŭ eĉ konataj al sciencistoj.

3. Ili montras la lokojn, kiuj povus esti rezervejoj de akvaj birdoj.

4. Ili donas multajn kaj mult-flankajn informojn pri birdoprotektado en diversaj partoj de la mondo.

Surbaze de la ricevita informoj, la internacia organizo *Wetlands International* (Marĉoj Internacie) – interalie, kun la sidejo en Roterdamo! – preparas tutmondajn raportojn. Dank’ al la Birdokalkuladoj oni starigis duonon el la 1171 Marĉejoj de Internacia Valoro. Oni uzas iliajn rezultojn ankaŭ en la preparado de la Ruĝa Libro de Internacia Unio por Naturprotekto kaj por la listoj de Gravaj Birdejoj de la internacia organizo *Birdlife International* – Birda Vivo Internacie. Surbaze de la



kalkuloj oni planas specialajn aktivitaĵojn de la E ŭ r o p a Komisiono kaj Eŭropa Unio por

protekto de maloftaj birdoj.

Post Birdokalkulo oni prijuĝas la kvanton de birdoj en ĉiu aparta birdaro. Tiuj kalkuloj jam okazis por 2250 populacioj de 840 specioj. Jen kion ili montris:

- Malgrandiĝantaj populacioj de akvaj birdoj en la tuta mondo konsistigas 40% de la tuto;

- Stabilaj – 35%;
- Kreskantaj – 21%;
- Formortantaj – 4%.

Ne tre esperige, ĉu?

Nia odesa junulara klubo “Verdaĵo” jam delonge okupiĝas pri ekologia aktivado. Ni organizis kelkajn ekskursojn “Dnestro” kaj jam ses-foje partoprenis en la januara Birdokalkulado. La aranĝo estas vera plezuro por nia klubo: ni veturas eksterurban kaj en granda salakva laguno kalkulas blankajn cignojn kaj nigrajn fulikojn, kiuj kune vintrumas tie. La ĉijara vintro estis tro varma: ne malpli ol 10 gradoj C, kio ne estas normala por nia regiono – tial al la laguno ne venis multaj cignoj, kiel antaŭe. Nenie sur la apudaj riveroj estis glacio, la manĝaĵoj multis, kaj la birdoj ne devis serĉi

helpo de homo por pasigi malfacilan tempon. Ja dum multaj jaroj venas al tiu laguno cignoj, kaj multaj odesanoj veturas speciale por manĝigi ilin kaj samtempe pasigi iom da tempo for de la urbaj odoraĉoj. Ĉi-foje ni vidis nur unu cignan familion: du gepatrojn kaj du gefilojn. Interalie, la gefiloj estis malpur-grizaj kaj mallertaj, same kiel la “malbela anasido” el la fama fabelo. La tago estis suna kaj bela, la akvo travidebla, la aero purega...

Ĉiujare ni invitas esperantistajn gastojn al niaj Birdokalkuladoj – sed neniu venas, kaj ni do devas dividi tiun ĝuon nur inter ni mem. Sed ni ne estas avaraj... Eble, iuj personoj en aliaj partoj de la mondo interesiĝas pri la vivo de la naturo? Ni volonte kontaktos. Al nia klubo eblas skribi: <verda99@mail.ru>.

cigno, fuliko, anaso – akvaj birdoj (vd. fotojn, de supre); “malbela anasido” – pro la samnoma rakonto de dana verkisto H. K. Andersen, la esprimo “malbela anasido” fariĝis simbolo de iu, kiu estas mokata pro malbeleco

laguno – lageto ĉe maro
marĉo – akveca, lageca tero
normo – reguligaĵo, sama por ĉiuj

observi – rigardi kun daŭra atento

rezervejo – loko, kie la naturo restas ne tuŝata de homo

specio – baza unuo de bestoj, plantoj ktp., kiuj tre similas inter si kaj povas naski idojn

stabila – malfacile ŝanĝebla aŭ neniiĝebla



Bosnio: praa modelo por tutmondiĝo

Verŝajne, vi jam scias, ke la lando de la ĉi-jara IJK – Bosnio-Hercegovino – havas multajn fierindaĵojn: riĉegan historion, varian naturon, belajn vidindaĵojn, bonkorajn homojn... Sed ĉu vi sciis, ke tiu ĉi negranda lando – iom pli ol 51 mil kvadratajn kilometrojn granda kaj kun ĉ. 4 milionoj da loĝantoj – havas la plej malnovajn landlimojn en la tuta Eŭropo?!

Profesoro Branko MILJKO, Bosnio-Hercegovino

Dum sia tuta pli ol miljara historio, Bosnio-Hercegovino praktikas, flegas kaj evoluigas ĉefajn, origine eŭropajn humanajn valorojn, gardante kaj savinte ilin por konfirmiĝi ĝenerale en la moderna Eŭropo. Temas ĝuste pri inter- kaj multkultureco, egalrajteco de diversaj sociaj elementoj kaj pri la fama demokratio. Nome ĉi tie – en la okcidenta Balkanio, la sudorienta Eŭropo – antaŭ la jaro 1200 fiksiĝis kaj daŭras ĝis hodiaŭ ligiteco de la popol- kaj landnomoj: bosnoj kaj Bosnio. La samo validas ankaŭ por la politika aspekto: kaj la Bosna regno estis (ĝis 1463) kaj pli postaj administraj provincoj de fremdaj ŝtatoj restis kiel integra Bosnio. Nur relative antaŭnelonge, okupinte la landon fine de 1878, la Aŭstro-Hungara Imperio ekoficialigis ties titolduobligon – Bosnio-Hercegovino, aldoninte la nomon de ĝia suda provinco. Nur du-tri eŭropaj popoloj pravos fieri pri tia kontinueco kaj kuneco de siaj nomo kaj teritorio.

Bosnio-Hercegovino situas sur la tereno, kie renkontiĝas kaj miksiĝas la sud-, mez- kaj orient-eŭropaj influoj – naturaj kaj kultur-historiaj. La antikvaj slavoj dum proksimume 200 jaroj almigradis Bosnion kun sia origina kulturo kaj miksiĝis kun la civilizigintaj eksromiaj civitanoj kun ties



La fama ponto (Stari Most) en Mostar

VIKIPEDIO

abunda diverseco de etnaj, kulturaj, moraj, kultaj kaj aliaj sociaj karakterizaĵoj. Ĝuste ili transire de la sepa al la oka jarcentoj post Kristo fiksas la dominadon de sia lingvo (estonte la bosna, en la 19-a jarcento ankaŭ la normigita kroata kaj serba) kaj organizis iaspecan ŝtaton. Tiam la aŭtoritato kunkonsistis el la eklezio kaj ŝtato: la unua regis la animojn kaj la alia – korpojn de la homoj. Por savi sian feliĉan, liberan socian variecon, la bosnoj longe rezistis oficialan kristanigon kaj subiĝon al unu el la imperioj: la Sankta Romia aŭ la Bizanca. Tiu problemo eĉ pli graviĝis en la 11-a jarcento, kiam la kristanismo skisme dividiĝis je la okcidenta – katolika kaj la orienta – ortodoksa. Tial establiĝis ankaŭ la Bosna Eklezio – kiel spirita flanko de la regno, kiu respektive konsideradis kaj defendadis la tradician ĉiuspecan plurismon: inter malnovaj kultoj vivis ankaŭ la ortodoksismo kaj katolikismo.

Dum la epoko de kruelaj ekleziaj persekutadoj en Eŭropo kaj okcidenta Azio Bosnio lumetis kiel konsola future-

ma espero: ĝi akceptadis tiamajn libere-majn intelektulojn, la “malbenindajn”, “damnindajn”... “herezulojn”. Bosnaj eklezio kaj religio pereis kun sia regno en la 15-a jarcento, pro la konkero fare de la turka Otomana Imperio. La Otomana Imperio alportis en la landon plian spiritan kaj civilizan ondon: islamon, kun kiu poste alvenis judismo de hebreoj rifuĝintaj el katolika Hispanio. Sekve, ĉi tie naskiĝis kaj evoluis netipa socio, resorbante multajn diversajn, eĉ malsamajn konsistaĵojn. Tamen, pro siaj longaj integreco kaj enradikiĝo, ĝi ĉiam sukcesis rekreadi sian specifan identecon: la plurismon de la homa vivo ĝenerale, kulturo, religio, moroj, politiko, ekonomio ktp. Sed ĉio ĉi ne estas simpla komplekso, nek sistemo el tolereme funkciantaj diferencaĵoj aŭ ties bonema kunvivado – ĝi estas tute mem-origina kvalito de homa komuneco: la ĉiuspekta plurismo de la socio kaj de la individuoj.

Do, Bosnio-Hercegovino estas la neordinara, delikata spirita kaj socia teksaĵo, kiu radikas, ŝajne, en la fora prahistorio kaj kiun ne facilas nomi. La scienco devos ankoraŭ multon diri tiutilate. Ekzemple, antaŭnelonge oni komencis esplori hipotezan sistemon el piramidoj en kaj ĉirkaŭ la urbo Visoko, proksimume 40 kilometrojn norde de Sarajevo. Kvankam mankas sufiĉa scienca materialo, multaj faktoj atestas, ke la popolo ĉi tie konstante naskadis kreivajn individuojn, kiuj kontribudis al la evoluo de la tuta homaro. Sed ĉio ĉi ŝajnas al ni normala kaj ĉiutaga, kaj ni preskaŭ neniel klopodas konigi niajn verkojn kaj karakterizaĵojn al la

Kial Bosnio-Hercegovino?

La unua konservita mencio de la nomo “Bosnio” troviĝas en la verko de la bizanca imperiestro Konstantino la Sepa en 958. Bosnio estas menciita ankaŭ en la Kroniko de la Pastro de Duklja de 1172-1196, kiu indikas ankaŭ pli fruan fonton de la jaro 753. La preciza signifo de la nomo “Bosnio” ne estas tute klara, estas kelkaj teorioj pri la nomo – la plej populara teorio pri la nomo “Bosnio” venas de la nomo de la rivero Bosna, ĉirkaŭ kiu establiĝis la lando. La originojn de la vorto “Hercegovino” eblas difini kun pli da precizeco. Dum la frua Mezepoko tiu ĉi regiono estis regata de potenca nobelo Stjepan Vukčić Kosača, kiu nomis sin *Herzog* (herzog [hercog] en la germana signifas grafo) – tiel oni komencis nomi la teritoriojn, kiun li regis, “la regno de Herzog”, aŭ “Hercegovina”. – laŭ Vikipedio

Fakte

mondo. La scienca engaĝiĝo necesas tiom pli, ĉar la ĝisnunaj “scioj” pri nia lando plejparte konsistas el la impertinentaj falsajtoj, kiuj prisilentas aŭ refutas la verajn faktojn kaj fabrikas primitivajn mensogojn kiel “historiajn verojn”.

Feliĉe, la nov-epoka tutmondiĝo malfermis al ni la mondon por prezenti nin rekte kaj publike. Multaj niaj filmoj estas jam monde konataj: la plej famaj

estas la Oskar-premiita “Nenies tero” de Danis TANOVIĆ kaj “Grbavica” de Jasmila ŽBANIĆ, gajninta ĉi-jare en Berlino tri premiojn. Mi neniel forgesu la Nobelpremion de Ivo ANDRIĆ por lia beletra verko antaŭ 45 jaroj; tiaspecan honoron atingis en Balkanio ankoraŭ nur unu greka verkisto.

Tamen, mi ne plu nombru ceterajn kulturajojn de Bosnio-Hercegovino, nek ties naturajn interesaĵojn – tio restu por viaj

rekta observado kaj impresoj. Mi nur rimarkigu: la enamiĝintoj al Bosnio(-Hercegovino) asertas, ke ĝi estas kultura kaj natura kondensiĝo de Eŭropo, kiu, malgraŭ ĉiuj penaj tentoj, tra multegaj jarcentoj daŭre funkciis kiel rememorigo kaj modelo por la malproksima tut-eŭropiĝo kaj tutmondiĝo.

Beletro en la tempo de tutmondiĝo, aŭ: Kial “tutmonda vilaĝano” legu bosnan libron?

Profesoro doktoro Zdenko LEŠIĆ

Nia epoko estas la epoko de tutmondiĝo. Tio signifas, ke niajn vivojn kaj la vivojn de ĉiuj komunumoj en la mondo decidige influas ekonomiaj kaj kulturaj fortoj, agantaj tutmonde. Fakte, oni malsame komprenas tiun ĉi procezon. Unuflanke, multaj el ni opinias tion pozitiva trajto de la moderna mondo, en kiu alireblo al teknologioj, informoj, servoj kaj merkato estas utila por ĉiuj, ĉar ĝi alportas ĝeneralan progreson, demokration kaj liberecon.

Aliflanke, multaj el ni konsideras tion nova formo de koloniigo – dominado de la okcidentaj nacioj super la evoluantaj landoj, kie okcidenta vivmaniero forviŝas distingajn karakterizaĵojn de la kulturo kaj de la socia strukturo de aliaj landoj, kreante la “tutmondan vilaĝon”, kiun regas kapitalistaj povcentroj kaj la tutmonda kapitalo. Iuj el ni, trie, opinias tion simple usonigado de la mondo – disvastigado de la usonaj ekonomia, politika kaj kultura influoj, per la milita superpotenco. Kiel ajn estas, ni ofte prave parolas, ke la moderna homo loĝas en la “tutmonda vilaĝo”.

Ĉu la “tutmonda vilaĝo” estas vere unueca?


Kiel ajn ni komprenas la procezon de tutmondiĝo, ni ofte preteratentas la paradok-

son, kiu estas en la esenco de tiu ĉi procezo. Ni kutime opinias ĝin procezo de unuigado kaj normigado, kiu marĝenigas specifajn trajtojn de lokaj komunumoj, forviŝas karakterizaĵojn de iliaj kulturoj kaj sociaj strukturoj, ignoras iliajn identecojn kaj – mallonge – mortigas la diferencojn. Sed la intensa komunikado, kiu nature akompanas la procezon de tutmondiĝo, efektive *konfirmas* kaj eĉ *generas* la diferencojn. Ju pli multe ni scias pri la mondo, des pli diversa ĝi fariĝas. Tial, parolante pri la mondo kiel pri la “tutmonda vilaĝo”, ni devas konsideri, ke la mondo, malgraŭ ĉio, ne estas unueca. La homoj neniam havos samajn ideojn nek idealojn pri tio, kiel organizi siajn socian, religian kaj kulturen vivojn.

Dum la lasta jardeko, tiun ĉi fakton devis konsideri eĉ la plej misfama firmao de la “tutmonda vilaĝo”, la korporacio McDonalds – antaŭnelonge ĝi, en siaj aziaj restoracioj, komencis metadi en la ĝis nun normigitan menuon ankaŭ lokajn specialaĵojn. Tiun ĉi paradokson eblas formuli jene: la “tutmonda vilaĝo”, en kiu ni loĝas, estas la mondo de malsamaĵoj, la mondo, en kiu homoj kaj loĝlokoj diferencas inter si. Alivorte, la tutmondiĝa procezo necesigas



IVO ANDRIĆ (portreto fare de KOSTA HAKMAN)



estimadon de la kulturaj malsamaĵoj kaj eĉ disvastigas ilin. Ni rememoru, ekzemple, ke en la plejmulto de eŭropaj urboj troveblas lokoj, kie eblas manĝi italan picon, meksikajn tortiljojn, hindan kareon, japanan suŝion kaj kelkloke foje ankaŭ niajn *ĉevapetojn**. Sed, kompreneble, tiel diversspeca estas ne nur la mondo de la nutraĵoj.

Kaj kio pri beletro?

La moderna pribeletra teorio konvinkas nin, ke la mondo de beletro estas “aŭtonoma regno”, spaco de tekste konstruita realaĵo, en kiu ĉiu “objekto” estas nur produkto de la lingva signado. Tamen, preninte libron en la manojn, ni hezitemas kredi, ke ĝia mondo neniom koncernas la mondon, en kiu ni vivas. Dum ni legas iun bonan romanon, nin kutime impresas ne nur tio, kiel ĝi estas lingve strukturita, sed ankaŭ kiel ĝi prezentas la mondon, kiun ni konas – aparte se ĝi eksplikas freŝan, novan, mirindan aŭ

pliprofundigitan imagon pri tiu mondo, kiu ekzistas ekster la teksto kaj kun kiu ni sopiras konatiĝi. Ekzemple, se mi ne legus romanojn de J. M. CETZEE, A. MCCALL-SMITH kaj Ngugi Wa THIONG'O, mi sciус pri Afriko nenion krom tio, kion al ni prezentadas la raportoj de CNN. Efektive, ĝuste per legado de iliaj romanoj mi fariĝis pli konvinkita, ke nia mondo – tiu “tutmonda vilaĝo” – estas fakte la mondo de malsamaĵoj.

Sendube, beletro kapablas disvastigi konscion pri la hibrideco de la homa raso, pri heterogeneco de la moderna kulturo, pri polifonio de nia propra kulturo kaj ne nur pri diferencoj de mult-etneco, sed super ĉio ankaŭ pri varioj de la individuaj pensoj, sentoj kaj revoj. Krome, beletro rafinas nian sentemon pri diferencoj kaj plifortigas nian kapablon ilin akcepti, estimi kaj respekti. Tiel ĝi kontribuas al la kreado de la etoso, en kiu la malsamaĵoj estas komprenataj kiel riĉaĵo de la homaro – same kiel malsamaĵoj en la naturo estas konsiderataj kiel riĉaĵo kaj belaĵo de la mondo, disponigata al ni donace.

Ni substreku similaĵojn, ne malsamaĵojn!

Parolante pri la loko de bosni-hercegovina beletro en la “tutmonda vilaĝo”, ni devas, miaopinie, konfesi du aferojn. Unue – nenio povas malkovri karakterizaĵojn de Bosnio-Hercegovino kaj ĝiaj homoj tiel kiel beletro mem (kaj belarto entute): tiu, kiu deziras konatiĝi kun Bosnio, certe prenos bosnan libron. Sed, aliflanke, oni povus prave demandi sin: “Kial mi legu pri la vivo de tiuj homoj, se ili neniel koncernas mian vivon?” Vere, ĉu la konatiĝo kun specifaĵoj de Bosnio-Hercegovino kaj ĝiaj loĝantoj estas sufiĉe forta argumento por decidi legi bosnan libron?

Lastatempe multaj teoriistoj esprimas konvinkigon, ke ni tro longe okupiĝis pri problemoj de variaĵoj kaj pri konfirmado de la malsamaĵoj, kaj ke nun ni devas turniĝi al la alia direkto kaj komenci emfazi ne malsamaĵojn, sed similaĵojn, egalaĵojn, “la familian parencecon” (tiel dirus WITTGENSTEIN), eĉ eble rekonfirmi la nocion “universalaleco” mem. Ŝajnas, ke la vortoj “varieco” kaj “univer-



Kastelo en Gradačac

saleco” estis konsiderataj kontraŭaj nocioj. Tamen ili ja, probable, estas ne reciproke ekskluzivaj, sed, male, – dialektike konformaj.

Kaj se estas ĝuste tiel, beletro povas perspektive ricevi novan rolon: legante pri la vivo de aliuloj, ni rimarkas, ke rakontado pri ili sciigas al ni iom ankaŭ pri nia propra vivo. La aliaj homoj estas nek plene samaj, nek plene aliaj. Legante, ni

ekkonas malsimilaĵojn kaj samtempe rekonas la parencecon. Do, se ne-bosnoj demandus: “Kial ni legu la bosnan beletron, se ĝi montras nur apartaĵojn de la bosnoj?”, oni povus respondi jene: “Ĉar la beletro, prezentante apartaĵojn de tiuj homoj, samtempe malkovras la homan naturon kaj sorton ĝenerale, kaj per tio – ankaŭ vian propran naturon kaj vian sorton”. Do, se ni kiel bosnoj estas apartaj, tio ne signifas ke ni estas solaj kaj unikaj. Ĝuste male: kvankam ni ja diferencas de aliaj homoj, tio vere signifas, ke ni estas nek tute samaj, nek plene aliaj.

En nia epoko de tutmondiĝo, legado de bosna literaturo estas, unuflanke, plia maniero rafini nian sentemon pri malsamecoj kaj plifortigi la kapablon akcepti, estimi kaj respekti la malsamaĵojn. Aliflanke, tio estas bona maniero konvinkiĝi, ke ni ne estas unikaj unusolaj estaĵoj, sed parto de la tutmonda reto, kiu faras la mondon unu sama familio.

Esperantigis Branko MILJKO

* ĉevapeto (*ĉevapi*) – (ne N.PIV-a) rostita viandrolaĵeto: populara plado en Bosnio kaj ĝenerale en Balkanio



Sur malnovegaj stratoj de Mostar oni ĉiam trovas ion interesan!

Multkultureco

Profesoro Branko MILJKO, Bosnio-Hercegovino

Plej koncize diri: multkultureco estas pluregismo de la konkretaj teoria kaj historia manifestaĵoj homspiritaj, dum tutmondiĝo estas la spirita kaj materiala procezo konsciĝi pri tiuj diferencaĵoj kaj iliaj interrilatoj; aŭ forme de la multkultureco reale konkretiĝas la homa esenco forme de la spirito.

La (post)moderna penso emfazas multkulturecon kaj ankaŭ aliajn plurismajn valorojn kiel esencajn postulaĵojn kaj elementojn de la socio en ĉi-epoka mondo demokratema. Nun ili estas eblaj kaj eĉ devigaj – almenaŭ formale, sed ne ĉiam estis ĉi tiel. Dum la fora pasinteco la gentoj kaj triboj vivis, agis kaj kreadis izolite; pri prosperoj de la spirito ankaŭ ĉe tiaj cirkonstancoj atestas klare kaj impresas forte iliaj mitoj kaj materialaj restaĵoj de la kulturo. Poste, kun la evoluo de la trafiko kaj ĝenerala ekonomio, pliintensiĝas komunikado sur vastaj teritorioj. Tio ebligis establiĝon de la space kaj nombre grandaj homaj komunumoj – ŝtatoj, kiuj fakte estis multkulturaj. En ili unuiĝis ekonomio kaj militado kiel materialaj agfortoj kun politiko kaj religio kiel spiritaj agfortoj. Jam tiam aperis la tumondiĝa tendenco, almenaŭ ideologie, principe kaj spirite. Ĝian praktikan realiĝon bremsadis almenaŭ du ĉefaj embarasoj: unue, tiamaj multcentraj principoj (regnoj), kvankam spirite la samaj, egoisme konfliktadis ekskluzivante unu la alian por akiri hegemonion tutmondan; due, (ankaŭ tiukaze) tiam ne sufiĉe evoluis la produktaj fortoj por ĉiuaspekte ligi la mondon per komunikado. Malgraŭ tiuj favoraj kondiĉoj aŭ ĝuste pro tio neniu el tiaj ŝtataj imperioj, eĉ ĝis niaj tagoj, sukcesis atingi tutmondecon, eĉ ne proksimuman.

En la pleja komenco de la 19-a jarcento tion efektivigis la kontraŭdira fenomeno: kapitalo kiel efika, praktika homspirito kaj ankaŭ kiel malaĵo de la spirito. Ĝi ŝajne dividiĝis inter la regnoj kaj, ene, ankaŭ inter la posedantoj – sed ĝi fakte universaliĝis absolute. Tion oni konfesis publike kaj oficiale apenaŭ post la sesdekaj jaroj de la ĵus pasinta jarcento. La kapitalo, do, montras kaj pluraspektecon, kaj universalecon de la spirito, estante



en la tutmondiĝo

bazo por la moderna tutmonda multkultureco.

Sekve ja, la spirito estas esenco kaj kerno de la kulturo: ne eksteraĵo, ne materialaĵo kaj ne videblaĵo, sed ĉiutaga internaĵo, forkaŝata de la homo, sed kaŝata en li mem. Ĝi estas tiu alia flanko de la mondo, kies klarajn signalojn oni sentas ĉiam ateste, la signalojn rekonendajn per la peno nomata sentado kaj pensado, kiuj estas fuĝejoj de la spirito.

La spirito ĉiam estis tiu ligo, tiu resonanco, tiu harmonia pulsado, kiu kontaktigas nin kun la mondo entute, kun la kosmo; tiu subtila kaj nerimarkebla vibrado en la homo, kiu al li ebligas moviĝi tra la tuta neperceptebla kaj nekomprenebla kosma spacego, reiri en la historion kaj antaŭeniĝi en la estontecon, regi la tempon kaj malfermi pordon de ĉiu estada maniero kaj de ĉiu manifestiĝo de la sama resonanco, kiun oni nomas *spirita homvivo*. Krome, estas klare, ke la fenomeno de la spirito ligas aktualajn homojn kun la estintoj, kiuj mirinde, ekzistante izolite, verkadis samaĵojn, sammaniere estadis kaj sin esprimadis laŭ unueca maniero homa.

Oni admiras ke al ni povas paroli homoj, kiuj ekzistis antaŭ longa tempo, ne nur lingve, sed ĉefe, per la spirita esprimado. Tiel la aktualuloj malfermiĝas por travivi desegnaĵojn de la kaverno homo, same kiel skarpojn aŭ ceramikaĵojn de la homoj perdiĝintaj en la nepercetebla vastegaĵo de Pacifiko aŭ de Andoj; same tiel malfermiĝas al ni skulptaĵoj de la antikveco, kiel la muziko de BACH, MOZART aŭ BEETHOVEN.

Do, ĉio ĉi pruvas, ke ĉiu homo posedas la spiriton kiel akson, ĉirkaŭ kiu li turniĝas kaj kiu lin senmezure alten levas super la sferon de la senpera ekzistado kaj asekuras lian senmortecon.

Koncerne la bosni-hercegovinan kulturon kiel specifan kaj samtiel universalan manifestiĝon de la homa spirito, koncerne la multkulturecon kaj tutmondiĝon, oni povas ĉie en la lando senti kaj rimarki ĝian radiadon, sed ne ĉiu kaj ne ĉiam kapablas diveni signifon de la travivaĵoj. Akceptu mian opinion, mi petas vin afable, ke estos multvalore kaj divers-utile kongresi en Sarajevo kaj vojaĝeti tra Bosnio-Hercegovino.

La formangigata... planedo

Felix ZESCH, Germanio

La nevegetaĵa nutrado damaĝas la naturmedion en grandega skalo. La bela bildo de bovino, kiuj feliĉe paŝtiĝas kaj transformas herbojn – plantojn por homo nedigesteblajn – en “valorajn nutraĵojn” neniel rilatas al la realeco, almenaŭ en la industrilandoj. En tiu ĉi artikolo mi volas montri, kiel la homa volo bredi kaj mortigi bestojn grandskale influas la naturmedion, de kiu ni ĉiuj dependas.

Malŝparo de produktiloj

Por satigi unu homon, kiu manĝas nur vegetaĵojn, necesas averaĝe ĉ. 0,07 hektaroj da agrikultura surfaco por jara manĝado. Por ovo-lakto-vegetarano bezonatas 0,2 ha, kaj por nevegetarano – 1,5 ha. Ne konsiderante la distribuproblemon, oni do povus nutri 21 vegetaĵanojn anstataŭ unu nevegetaĵano. En hektaro da kamparo oni povas produkti duontunon da planta proteino – aŭ 50 kg da vianda proteino. Tio estas ne nur grandega malŝparo de nutraĵoj, sed ankaŭ de surfaco, akvo, energio kaj transportkostoj.

La malŝparo de energio kaj transportkostoj estas logike tuj videbla. Ja ankaŭ la brutoj kaj kortobirdoj devas manĝi plantojn por vivi kaj, almenaŭ en industria bredado, la bestoj ne venas al la nutrado, sed – inverse – la grenoj estas transportataj al bestproduktejoj. Anstataŭe, oni povus distribui ilin rekte al homoj, kaj tio certe malplialtigus la kostojn. Nuntempe 36% de la grenoj, rikoltataj tutmonde, kaj 70% de la monda rikolto de sojo estas donataj al brutoj.

Malŝparo de akvo

70% de la tutmonde disponebla trinkebla akvo estas uzata en agrokulturo, kies produktoj estas grandskale manĝigataj al viandobestoj – aldone, ja ankaŭ la bestoj mem trinkas akvon.

Por produkti 1 kg da bovaĵo estas uzataj, laŭ plej modera kalkulo, 3700 litroj da akvo, laŭ alia – 100 mil litroj, dum por 1 kg da greno – ĉ. 120 litroj. Alivorte, la konsumo de unu kg da bovaĵo, plej minimume, necesigas proksimume la saman akvokvanton, kiel 35 bankuvoj aŭ 300 tralavoj de necesabo.

Por kompari la nutran valoron de viando kaj plantoj ni uzu iliajn valoron en kilokalorioj. Unu kg da viando donas 2800 kilokaloriojn kaj 174 g da proteinoj, dum unu kg da tritiko donas 3300 kilokaloriojn kaj 100 g da proteinoj. Oni povas do konkludi, ke tritiko donas 27,5 kilokaloriojn je unu litro da akvo, kiun oni uzis por produkti ĝin, dum bovaĵo – 0,75 kilokaloriojn je unu litro – kaj tio estas nur laŭ la plej moderaj kalkuloj.

La akvoevolua raporto de 2003 de la UN prognozas, ke en la jaro 2050 pro akvomanko suferos, en la plej malbona kazo, sep miliardoj da homoj en 60 landoj, kaj en la plej bona kazo



– du miliardoj da homoj en 48 landoj. Por kontentigi la ĉiutagajn bezonojn oni devas havi 20-50 litrojn da pura akvo. Granda parto de la grenoj por nutri bredbestojn estas produktaj en la kamparoj de evolulandoj, kie akvo jam sen tio estus nesufiĉa.

Malpurigo per toksaĵoj

En agrikultura produktado tre ofte estas uzataj pesticidoj kaj aliaj toksaĵoj. Ili pli amasiĝas laŭ la nutra ĉeno kaj rezulte la toksaĵoj estas plej alte koncentritaj en viando, precipe hepato. Tiel, ĝuste por bestproduktejo sume estas uzate multe pli da pesticidoj, ol por nure planta produktado. Se oni ne devus nutri bestojn per plantoj, oni povus utiligi tute aliajn kaj multe pli naturamikajn produktmetodojn. La tuta homaro tiam bezonus multe malpli da agroj.

Kontribuo al la forceja efiko

Metano el bovinaj stomakoj estas alia ĉefa kaŭzo de la forceja efiko. Nome, unu bovino eligas duoble pli da metano ol unu aŭto sen katalizilo. La 1,3 miliardoj da bredataj bovoj (aŭ, pli ĝuste, iliaj konsumantoj) respondecas pri 12% de la tutmonda eligo de metano. Kaj al tio ankoraŭ aldoniĝas eligoj de aliaj breditaj best-specoj, kion oni ja povus eviti. Tio eĉ pli gravas konsiderante, ke unu molekulo de metano kontribuas 25-oble pli al la forceja efiko ol unu molekulo de karbondioksido.

Detruo de ekologiaj sistemoj

La vere valoraj kaj uzeblaj plantaj nutraĵoj de sojo kaj grenoj en la besta “maŝino” transformiĝas, interalie, en korpan varmecon, sed ĉefe en solidajn, likvajn kaj gasajn eligaĵojn. La urinaj bakterioj ŝanĝas urinon en amoniakon, kiu fariĝas nitrato kaj poste, kun pluvo – nitra acido. La “acida pluvo” kaŭzas silentan morton de lagoj kaj arbaroj.

Grandegaj bovaroj per siaj hufoj damaĝas herbejojn kaj pereigas tutajn speciojn de plantoj, detruante la ekologian sistemon. Ekzemple, granda parto de Saharo estiĝis pro paŝbestoj, kiuj formangis la plantojn, kiuj protektis ĝin, tiel ke la grundo eroziigis. Sole per bovbredado



ĉiujare 25 milionoj (!) da tunoj de humogrundo estas detruataj, kio malpliigas je triono la agre uzeblan tersurfaco en la 20 jarcento.

Praarbaroj estas forbruligataj ne por ricevi lignon, sed por krei paŝtejojn (kaj agrojn – Red.). Tio kaŭzas formortadon de multegaj bestaj kaj plantaj specioj kaj ŝanĝas la klimaton. Ĉiujare 30 mil hektaroj da praarbaro estas forbruligataj por viandoproduktado. Ekde 1960 pli ol kvarono de la praarbaroj en Centra Ameriko estis detruitaj por krei bovpaŝtejojn. Similcele estis forbruligitaj 38% de la amazoniaj praarbaroj.

Laŭ la usona Mediprotekta Agentejo (*Environmental Protection Agency*), bestproduktejo rubo kaŭzas pli gravajn problemojn, ol ĉiuj industriaj rubaĵoj kune.

Troa fiŝkaptado

Multaj fiŝspecioj preskaŭ malaperis pro troa fiŝkaptado. La “senvaloraj” fiŝoj, kiuj mortas en la retoj dum fiŝkaptado, estas reĵetataj maren. Por la fiŝoj mem tio, kompreneble, signifas morton, por la medio – plian problemon. Preskaŭ triono de la fiŝoj, kaptataj nuntempe, estas reĵetataj maren jam mortaj aŭ vundegitaj. Kiam temas pri salikokoj, eĉ 80% de la kaptajo estas senvalora. Sed la fiŝkaptado havas ankoraŭ multajn aliajn kromefikojn, kiel ekstermado de tutaj specioj kaj detruado de la natura margrundo. Krome, multaj fiŝoj estas manĝigataj al brutoj kiel nutrado – jen aldone malŝparo de naturrimedoj.

Fiŝoj nuntempe ne plu estas kaptataj nur en la maro. Jam ekzistas grandskala industria fiŝbredado, kaj ankaŭ tie, same kiel en bovproduktejo, temas pri malŝparo de naturrimedoj. Breditaj fiŝoj manĝas ĉefe marajn fiŝojn kaj sekve por unu tuno da bredfiŝo necesas tri tunoj da marfiŝoj. Ĉiujare en la mondo estas vendataj ĉ. 30 milionoj da fiŝoj. Ankaŭ en tiu amasa produktado ekestas malpura akvo, plena je ekskremento kaj kuracilrestaĵoj en grandaj kvantoj.

Kemiaĵoj por ledo

Damaĝojn al la medio kaŭzas produktado de ne nur viando, ovoĵoj aŭ lakto, sed ankaŭ de lano kaj ledo. Kompreneble, ankaŭ produktado de

kotono aŭ artefaritajoj por senbestajaj vestaĵoj ne nepre estas bonaj por la medio.

Ledo konsistas ĉefe el haŭto de mortigitaj bestoj, kiuj en sia vivo jam multe malpurigis la naturmedion. Ĉar tiu haŭto normale putrus, oni traktas ĝin kemie. Unu kvinonon de ledeto konsistigas taniloj, grasigiloj kaj farbiloj. La antaŭe uzata ĉeltoksaĵo PCP estas nuntempe malpermesita – sed anstataŭe oni uzas same danĝerajn substancojn, kiel tri- kaj tetraklorfenolo aŭ tribromfenolo. 90% de ledeto estas traktataj per la pezmetalo kromio. Multaj toksaj substancoj, parte kancerkaŭzaj, kiel hidrargo, kupro, kobalto, arseno, plumbo ktp. troviĝas en ledeto. Sed eĉ vegetaĵe tanita ledeto estas dubinda el ekologia vidpunkto, ĉar oni uzas por tio

monokulturojn de tropikaj kaj subtropikaj plantoj. La forbrulado de rubo aŭ rubaĵejoj malpurigas la aeron, teron kaj akvon. Pro tio, ke oni uzas inter 20 kaj 100 litrojn da akvo por unu kilogramo da haŭto, la leda industrio apartenas al la industrioj kun la plej alta akvokonsumado.

Bestaj rajtoj utilas

La ekologiaj sekvoj de bestproduktado kaj utiligado estas gigantaj. Ili multe kontribuas al la problemoj de sano, monda malsato kaj ekologia stabileco de la planedo. Oni povus imagi kondiĉojn, en kiuj estus multe malpli da malpurigo pro ties produktado. Sed tiuj teorioj ne gravas por la medio. Por ĝi gravas la

hodiaŭaj kondiĉoj kaj sekvoj de bestutiligo. Evidente, la medio suferus multe malpli, se la homo ne utiligus bestojn por nutrado. Kaj sekve de tio, ankaŭ la homo malpli suferus.

En homara historio oni ofte donis rajtojn al grupoj ne nur ĉar tio estis etike bone, sed ankaŭ ĉar tio utilis. Ĝis kioma grado la ekologiaj problemoj de la planedo ankoraŭ devas pliakriĝi, por ke la homo ekkomprenu, ke la samo validas ankaŭ por bestaj rajtoj?

forcejo – kovrita ejo por kreskigi plantojn
monokulturo – sola plantspecio, kreskigita sur certa teritorio

Verkita speciale por KONTAKTO. Plena artikolo kun indiko de la fontoj troviĝas ĉe <http://www.felix-zesch.de/bin/kontakto-ekologiaj-sekvoj.pdf>

Grashepataĵo



Marco Trevisan HERRAZ,
Italio/Hispanio

La grashepataĵon oni faras el hepato de anaso aŭ ansero, kiu estas perforte supernutrita dum kelkaj semajnoj per miksaĵo de maizo kaj oleo. Tio ĉi tute ne estas sekreto, sed... ĉu vi iam konis la detalojn de tiu ĉi procezo?

En la komenco oni elektas nur la virbirdojn; oni ne uzas inojn, ĉar ili estas pli malfortaj, kaj tial ili ne atingus la finon de la procezo. Per la inoj oni produktas nur viandon, kaj tial ili estas mortigitaj kiam ili atingas la taŭgan pezon.

Ne multaj homoj surpriziĝus vidante la anasojn en malgrandaj kaĝoj. Temas pri tipa bildo, kiun preskaŭ ĉiuj iam vidis en televido aŭ revuoj (ekzemple, kiam oni parolas pri ovproduktantaj kokinoj).

Ne malofte oni trovas en tiuj kaĝoj bestojn mortintajn aŭ vunditajn, plene forgesitajn. En la naturo, la plumaro devus esti blanka, sed en la kondiĉoj, kiujn ili suferas, ĝi griziĝas.

Por enigi plurajn kilogramojn rekte en la stomakon de la

anaso oni uzas specialan maŝinon. Oni bezonas nur kelkajn sekundojn por fari tion. La tubon oni enigas rekte en la buŝon de la birdo. Ĉiufoje oni enstomakigas grandegan kvanton, ekvivalentan por homo al kvin kilogramoj da manĝaĵo.

Kelkaj anasoj estas vundataj dum la manĝigado. La mortoprobableco en grashepat-produktejoj estas ĝis dudekoble pli alta ol en aliaj anasejoj. Multaj mortas pro la vundoj en la **ezofago**, kiujn faras la manĝigilo. Aliaj mortas ĉar ilia stomako krevas...

Fojfoje la pinto de ilia beko estas intence fortranĉata, kaj la besto estas deformita dumvive. Tion ĉi oni faras por eviti, ke la

anasoj piku unu la alian, ĉar la kondiĉoj estas tiaj, ke kelkaj fariĝas pli perfortemaj. En tiu ĉi korp parto la nervoj multas, kaj tiel la anasoj kun tranĉita beko sentas doloron dum la tuta vivo. Aliaj mortas pro vomzufokiĝo antaŭ la fino de la procezo.

En la fino de la perfortmanĝiga ciklo, malfacilas eĉ piedirado, kaj la flugiloj necesas. La hepato fariĝas dekoble pli granda ol normale kaj puŝas la aliajn organojn. Tiel, ankaŭ la spirado malkomfortas kaj komplikiĝas.

La hepato ne plu funkcias, kaj tio ĉi signifas, ke ĝi ne forigas la toksaĵojn el la sango. La sango fariĝas malpura, kaj la toksoj damaĝas aliajn organojn, kiel ekzemple la cerbon. Tiuj ĉi malsanoj nomiĝas lipida hepatozo kaj hepata encefalopatio. Inter aliaj simptomoj estas senĉesa kapdoloro, febro, deprimado kaj epilepsiaj atakoj. Anaso sentas doloron ankaŭ dum siaj lastaj vivmomentoj.

Almenaŭ 24 milionoj da anasoj kaj unu miliono da anseroj mortas ĉiujare pro la produktado de grashepataĵo. La homoj, kiuj produktas ĝin, diras, ke la migrantaj birdoj en la naturo ja havas supermanĝo-periodojn,

por havi energion dum la migrado, kaj en la grashepat-produktejoj oni nur plilongigas iomete tiun ĉi naturan periodon. Tiu ĉi argumento estas tute sensenca, ĉar:

1) Neniu birdo manĝas ĝismorte, eĉ en antaŭmigrperiodoj.

2) La birdoj, kiujn oni uzas por grashepataĵa produktado apartenas al variaĵoj, kiuj neniam migras, kaj ili tre multe suferas pro tiu ĉi ekstrema nutrado.

Se oni ŝatas grashepataĵon, sed ne volas dolorigi la birdojn, oni ja povas aĉeti “vegetaran grashepataĵon”. Foje oni nomas ĝin *faux-gras* (falsa graso en la franca, kreante vortludon kun *foie-gras*, la franca vorto por grashepataĵo). Ĝi konsistas el fungoj, toŭfuo kaj aliaj nebestaj manĝaĵoj, kaj ĝia produktado estas kruelaj al neniu vivulo.

Elektu la vivon!

ezofago – tubo, kondukanta la nutraĵojn de la gorgo en la stomakon

Pliaj informoj pri grashepataĵo troviĝas ĉe <http://www.nofiegras.org> (anglalingva paĝaro) kaj en Vikipedio.

Fakte

Perforta manĝigado estas malpermesata en Argentino, Aŭstrio (6 el 9 provincoj), Ĉeĥio, Danio, Finnlando, Germanio, Irlando, Israelo (ekde 2005), Italio, Luksemburgo, Norvegio, Pollando (ekde 1999 – ĝi estis la kvina plej granda produktanto de grashepataĵo), Svedio, Svisio, Nederlando, Britio, Usono: Kalifornio (efektiviĝos en 2012) kaj Ĉikago, Ilinojso – laŭ Vikipedio.



Elektu la vivon!

Al la socio kun malmultaj bestoj-suferantoj



KOMPLEZE DE E.M.

Etsuo MIYOSHI, Japanio

En mia domo loĝas kvar forĵetitaj hundoj kaj kvin katoj. La hundoj estas libere tenataj en la malantaŭ-doma ĉirkaŭ-murita ejo. Kiam mi trovis la katon Blanka, ĝi estis katido, malseka pro pluvo kaj ploranta en la najbara herba densejo. La trikolora kato Songō venis sen la malantaŭa dekstra kruro: mia filino venis hejmen plorante, kun la kompatinda kato en la manoj; best-kuracisto devis fari **operacion** por savi ĝin.

Foje mi aŭdis, ke virino el la urbo Takamacu prizorgas 21 forĵetitajn hundojn kaj katojn kun katidoj, kaj ke ŝi tre suferas. Profunde pripensinte, mi pagis la kostojn de kontraŭ-idad operacioj, solvante la problemon.

En Japanio oni ĉiujare portas ĉirkaŭ 400 mil hundojn kaj ĉirkaŭ 300 mil katojn al mortigejoj. Ili tie pasigas tri-kvar **mizerajn** tagojn kaj poste estas gasumataj. Plie, ankaŭ milionoj da forĵetitaj hejmbestoj perdas siajn vivojn pro malsato, neĝo, pluvoj kaj ventoj.

Se eblus uzi \$600 milionojn jare, kiujn oni elspezas por mortigi tiajn bestojn, por la nask-male-

bligo, oni certe povus ege malmultigi malfeliĉajn bestojn. Alilflanke, la Brita Federacio por Malebligo de Perbestaj **Ekspertoj** (50 mil anoj) sukcesis fari filmeton en japana esploro, kaj **konsciigis** pri la problemo la esploristojn, kiuj tute ne interesiĝis pri la sanstato de la eksperimentaj bestoj. Celante ŝanĝi la administradon de bestoprotektado, la asocioj **protestis** al la brita **ambasadoro** en Japanio kaj al la japana registaro. (En Eŭropa Unio, dank' al grandaj protestoj kaj kolektado de subskriboj, ekde la jaro 2000 perbestaj eksperimentoj en la **kosmetikaj** industrio estas malpermesataj.)

En filmoj oni povas vidi, ke multaj hejm-bestoj eĉ dumdorme restas en metalaj **kaĝoj**, pro forta **streso** ili eligas okulajn kaj nazajn likvaĵojn, kaj perdas vidkapablon. Eksperimentaj bestoj pasigas vintron sur frosta metalo; la **ungoj** de katoj kaj aliaj bestoj, kaptitaj en la kaĝo, malrektiĝas, kaj pro la malespero ili eĉ aspektas mense malsanaj. Kiam mi pensas, ke oni eĉ ne faris memor-tabulon por la milionoj da eksperimentataj bestoj, mi ploras.

En Japanio ekzistas neniuj reguloj kaj normoj rilate perbestajn eksperimentojn, do en la kosmetikaj kaj kuracila industrioj, en universitatoj ktp. multfoje ripetiĝas la samaj eksperimentoj, kaj ĉiujare ĉirkaŭ dek milionoj da

musoj, hundoj, katoj ktp. estas forĵetataj post la uzado. Mi, kiu konas nur homan perforiton, kompatas la suferajn mortantajn bestojn, kaj perdis kor-trankvilon pro tagnoktaj kolero kaj malĝojo...

Japana verkisto s-ro KUSAYANAGI Daizo, dungita kiel instruisto en politik-ekonomia kromlernejo de Matsushita, diris, ke en 80% de la bestomortigoj la kialo estas, ke "la besto ne plu teneblas". Li kun malĝojo skribis



Perbestaj eksperimentoj estas ĉi-monde la plej peka krimo

pri tia facilanima portado de hejm-bestoj al mortigejoj: "ankaŭ eduke necesas **revizii** nian takson pri la valoro de la vivo". Same la sanktulo GANDHI diris: "Perbestaj eksperimentoj estas ĉi-monde la plej **peka krimo**".

Mi volas ellabori leĝojn por altigi la **moralon** de bestaj tenantoj, minimume eviti ripetajn perbestajn eksperimentojn kaj

deziras **epok**-faran turno-punkton en besta administrado. Mi volas ankaŭ, ke oni bezonu permesilon por vendi kaj bredi bestojn, kiel indas en evoluantaj landoj.

S-ro Etsuo MIYOSHI estas loĝanto de Ŝirotori-ĉou, Kagawa-ken, prezidanto de la korporacio *Swany*: "Miaj vivceloj estas Unu Dio – t.e. interligi la religian mondon; Unu Mondo – subteni la Mond-Federisman Movadon; Unu Internacia Lingvo – kunlabori kun la movado por la internacia lingvo Esperanto; kaj krei socion sen bestaj eksperimentoj, en kiu eblas kunvivi kun bestoj". Unue aperis en la gazeto *Cirko*, faciligita kaj iom mal-longigita.

- ambasadoro** – tiu, kiu reprezentas unu ŝtaton en la alia
- eksperimento** – elprovo
- epoko** – jararo
- kaĝo** – portebla besta loĝejo el metalaj fadenoj
- konscii** – havi klaran scion pri siaj agoj kaj travivaĵoj
- kosmetiko** – arto ornamo vizaĝon;
- kosmetikajo** – belec-kremo, lipruĝoj, dentopasto kaj tiel plu
- krimo** – malmorala faro, misfaro, malobeo al leĝo
- mizera** – malfeliĉega
- moralo** – reguloj en socio, laŭ kiuj oni povas juĝi pri bono kaj malbono
- operacio** – kuracista ago, per manoj kaj iloj, por ŝanĝi ŝtaton de organo aŭ fortranĉi malsanan, nekuraciblan parton de korpo
- peki** – agi kontraŭ religia aŭ morala leĝo
- protesti** – agi kontraŭ io, kion oni opinias nevera aŭ nejusta
- revizii** – esplori, kontroli, rekonid-eri
- streso** – grandega malkomforteco
- ungo** – malmola supro de fingroj



“Sed tiun paŝon devas fari vi!”

Diana SAKAJEVA, Rusio

Ĉiu epoko havis siajn elstarajn vegetaranojn. Ni ĉiuj konas ilin: Pitagoro, Leonardo da VINCI, Leo TOLSTOJ, George HARRISON, Mary SHELLEY... la listo estas tro longa. Por iuj vegetarismo estis baza kondiĉo de sana vivmaniero, eterna korpa kaj anima juneco, por aliaj – la sola vojo al spirita evoluo kaj pureco de la animo. Sed kio allogas nin, infanojn de la 21-a jarcento, al la senmurda vivmaniero? Kio inspiras nin rifuzi morton per viando? Povas esti tio, ke nuntempe vegetarismo estas la sola maniero resti honesta al si mem. Ĉar...

Ni, kiuj bone scias kiel stas la aferoj en la

moderna mondo kaj legas raportojn el la “Tutmonda vilaĝo”, ne plu povas fermi la okulojn kaj nur ĝui nian propran feliĉon. En la mondo, kie ĉiujare pro malsato mortas ses milionoj da infanoj, manĝi viandon signifas lasi ilin morti. Kaj ĝenerale pro nesufiĉa manĝado suferas ĉirkaŭ 852 milionoj da homoj. Tio okazas ĉar la homaro fuŝe eluzadas la plejparton de ĉiuj disponeblaj nutraĵoj. 80% de legomaro kaj grenaro, produktataj sur nia planedo, estas uzataj por nutri brutojn. Por ricevi unu kilogramon da viando oni bezonas 16 kilogramojn da grenoj. La faktoj diras, ke problemo de malsato estas artefarita. Oni produktas sufiĉe por satigi ĉiujn. Ni ne fuŝu la aferon! Se tiuj legomoj kaj grenoj irus rekte sur niajn

tablojn sen perdiĝi ie mezvoje, la ŝancon por saviĝi havus ĉiuj.

Ni, kiuj aprezas egalrajtecon de ĉiuj homoj sendepende de la haŭtkoloro aŭ sekso, ankaŭ volas ke ĉiuj vivaj estaĵoj estu samgrade bone traktataj kaj respektataj. Ja neniuj naskiĝas por esti ies sklavo, por vivi kaj morti en mizero. Valorigo de nur unu specio estas formo de faŝismo, kaj faŝismon oni kutime ne aprobas. Gasaj kameroj (uzataj por mortigi bestojn kaj ne damaĝi ilian belan felon), kruelaj medicinaj eksperimentoj kaj testado de diversaj ĥemiaĵoj – tiuj estas metodoj el Buchenwald kaj Auschwitz. Kial do ne ekrigardi pli vaste kaj pli profunde, ne forĵeti antaŭjuĝojn kaj ne ekvidi, ke ekspluatado de bestoj devas resti en la pasinteco kiel honta memoraĵo, kiu neniam plu devas ripetiĝi.

Ni, kiuj forĵetis antaŭjuĝojn, povas klare vidi, ke intensa bestbredado estas katastrofo por nia planedo kaj minaco por nia estonteco. Nun ĝi estas praktikata preskaŭ ĉie en la mondo kaj rezultigas malaperon de tropikaj arbaroj kaj iliaj loĝantoj (unikaj specioj de bestoj kaj indiĝenaj popoloj), poluon de tero, akvo kaj aero.

Same kiel bestbredado detruas la planedon, viandmanĝado malutilas por homa sano. Estas evidente ke tiu, kiu manĝas riĉajn je vitaminoj kaj antioksidantoj freŝajn fruktojn kaj legomojn, nuksojn kaj grenojn, multe pli sanas kaj

energias ol tiu, kies dieto baziĝas sur viando, ovoj, laktaĵoj kaj fiŝo. Ja viandon konsistigas saturitaj grasoj kaj kolesterolo danĝeraj por la sano, kaj ankaŭ hormonoj, antibiotikoj kaj vakcinoj, kiuj estas enigitaj por malebligi malsanojn de brutoj.

Tamen stereotipo, ke homo ne povas vivi sen manĝi viandon, ankoraŭ fortas en nia socio. Estas amuza ĉi-tema historio. Iam oni demandis 70-jaraĝan George Bernard SHAW [ĝorg bernard ŝo] kiel li fartas. “Tre bone, tre bone. Nur kuracistoj ĝenas min, kiuj insistas, ke mi mortos pro tio, ke mi ne manĝas viandon”.

Post 20 jaroj oni denove demandis jam 90-jaraĝan SHAW kiel li fartas. “Tre bone, – respondis li. – Neniu jam ĝenas min. La kuracistoj, kiuj timigis min, ke mi ne povos vivi sen viando, jam mortis”. Por Bernard SHAW kaj por multaj aliaj, kiuj sukcesis superi tiun stereotipon, transiri al vegetara dieto estis facile. Kaj tiu eta ŝanĝo de ies manĝkutimoj nepre faras bonon al la mondo.

Paŝo al egalrajteco de riĉuloj kaj povruloj, virinoj kaj viroj, bestoj kaj homoj estas tute simpla. Sed tiun paŝon devas fari vi. Nun.

“Vegetarismo kreos pli da senlaboraj agrikulturistoj en riĉaj landoj sen helpi al la malriĉaj”

Joshua LANGFORD, Usono

Homoj alprenas vegetaran vivstilon aŭ antaŭenigas vegetarismon pro multaj motivoj. Inter ili troviĝas sano, personaj spiritaj kialoj (pureco de la korpo), etikaj kialoj (rilate bestojn), ekologiaj kialoj kaj eĉ ekonomiaj kialoj: oni ofte asertas, ke produktado de viando estas malŝparo de naturrimedoj. Komprenible mi respektas kaj subtenas la rajton de ĉiu vivi laŭ la nutrajmaniero, kiu plej konvenas al li/ŝi. Sed foje ŝajnas al mi ke iuj pli radikalaj vegetaranoj (des pli veganoj) emas konvinki aliajn per argumentoj kiuj ne plene baziĝas sur faktoj aŭ kiuj misrepresentas la realon.

La problemo estas ne produktado de sufiĉe da manĝaĵoj, sed ja distribuado

La plej frapa misa argumento pri la maldezirindeco de viando-produktado kaj konsumado estas tiu, kiu argumentas surbaze de ekonomio. Oni asertas, ke se oni dediĉus agrikulturajn rimedojn nur al produktado de plantaj manĝaĵoj, malsato en la mondo ne ekzistus, ĉar oni povas produkti multe pli da plantaj manĝaĵoj ol bestaj manĝaĵoj per la sama kvanto de agrikultura tero. Nu, eble se ni vivus en utopio tio verus (ĉar mi ne disputas la sciencajn kalkulojn de tiu argumento). Tion, kion mi ja disputas, estas la aserto, ke tiaj prak-

tikoj forigus malsaton en la mondo. Por ke tio okazu, necesus multe, multe pli ol ŝanĝo de manĝkutimoj. Necesus ankaŭ profundaj politikaj kaj ekonomiaj reformoj. Ekzemple, en Usono nuntempe (kaj ofte en la pasintaj jaroj) la kvanto de agrikulturaj produktoj (aparte grenoj) daŭre superas la merkatan postulon por ili. Pro tio, la usona registaro ofte aĉetas la troajn produktojn. Do, eĉ nun la problemo estas ne produktado de sufiĉe da manĝaĵoj, sed ja distribuado. Se ni simple koncentriĝus je la forigo de la kutimo manĝi viandon, ni simple kreos pli da senlaboraj agrikulturistoj en riĉaj landoj sen helpi al la malriĉaj.

Alia ofta kritiko fare de vegetaranoj/veganoj estas ke uzo de bestoj por manĝaĵo estas maletika ĉar ĝi estas *kruela*. Nu, certe mi konsentas ke iuj praktikoj, ekzemple produktado de grashepataĵo aŭ bovidaĵo, estas kruelaj – kaj ankaŭ mi tiujn kondamnas. Sed finfine la demando estas – ĉu estas kruele mortigi beston por manĝaĵo. La pli radikalaj antaŭenigantoj de bestaj rajtoj asertas, ke uzi beston por manĝaĵaj celoj estas per si mem malmorale. Nu, eble se oni metas homojn kaj bestojn sur la saman nivelon oni povas tiel argumenti (t.e. ke homoj estas nur speco de besto kaj nenio pli). Sed mi trovas tiun sintenon erara. Jes, laŭ biologia vidpunkto, homoj estas bestoj. Sed homoj ankaŭ tre malsimilas de bestoj laŭ intelekta kaj psika vidpunktoj. Kvankam bestoj estas ĝenerale konsciaj (almenaŭ altaj bestoj), nur homoj estas memkonsciaj. Tio, komprenible, ne signifas ke oni rajtas suferigi bestojn nenecese. Sed tio ankaŭ ne signifas, ke eblas meti bestojn kaj homojn sur la saman nivelon.

Tiu ekstrema argumento, laŭ kiu ĉiuj bestoj – ekde fiŝoj ĝis hundoj – estas ĉiuj sur la sama nivelo, kaj plue, ke homoj ankaŭ estas sur tiu sama nivelo, ignoras la naturan ordon. Estas evidente al ajna senpartia observanto, ke en la naturo ekzistas hierarkio. Eĉ la ekstremismaj

veganoj ne neas ĉi tiun fakton, ĉar ili evidente agnoskas, ke bestoj estas pli altaj ol plantoj (ĉar ni rajtas manĝi plantojn). Sed la natura hierarkio estas pli ampleksa ol simpla diferenco inter bestoj kaj plantoj. Ankaŭ en la besta regno estas hierarkio: ĉu vere veganoj kredas, ke, ekzemple, delfenoj estas sur la sama nivelo kiel musoj aŭ fiŝoj?.. Ĉu oni kondamnu niajn hejmajn katojn, kiuj manĝas nur viandon? Estas nature al kato manĝi viandon (kaj efektive estas tute malnature ke katoj manĝu plantaĵojn – katoj estas puraj viandmanĝantoj). Ĉu estas tiel terure, se homo – kiu estas pli alta ol ĉiu bestoj – manĝas viandon?

Ni unue koncentriĝu pri la nesuferigaj buĉprocezoj – anstataŭ eterne debati pri viandmanĝado, vegetarismo kaj veganismo

Sed, ĉion ĉi dirinte, homoj devas agi responde. Kvankam ne estas kruele *mortigi* bestojn por manĝaj celoj, ja estas kruele ilin suferigi – kaj mi konsentas, ke multaj modernaj industriaj viandproduktaj metodoj ja ne estas tre humanaj. Se oni mortigas beston por manĝaj celoj, oni devus ne suferigi ĝin. Ĝuste ĉi-rilate dividiĝas diversaj homoj kaj organizoj, kiuj okupiĝas pri la etika traktado de bestoj. Pli ekstremaj tendencoj asertas, ke mortigi aŭ iel uzi bestojn por manĝaj celoj estas malmorale, dum pli moderaj tendencoj diras, ke se oni mortigas beston, oni devas tion fari sen suferigi ĝin. Laŭ mi, la pli ekstremaj voĉoj polarigas la debaton – la nevegetaranoj, kiuj tamen eble subtenus pli etikan traktadon de bestoj, estas forpuŝataj de la ekstremistoj, kiu insistas pri absoluta ĉeso de viandkonsumo, laktokonsumo aŭ ledokonsumo – kaj ankaŭ insistas pri la egaleco de homoj kaj bestoj. Pro tiu divido neniuj progresoj eblas.

Mi ne estas vegetarano. Sed ankaŭ mi kontraŭas nenecesan suferigon de bestoj. Laŭ mi, ni ĉiuj, kiuj iel interesiĝas pri etika traktado de bestoj, devus unue koncentriĝi pri la nesuferigaj buĉprocezoj – anstataŭ eterne debati inter ni pri viandmanĝado, vegetarismo kaj veganismo. Mi mem vivas laŭ la principoj de la amerikaj indianoj: kiam oni mortigas kaj manĝas beston, oni dankas al la animo de tiu besto.



En Usono nuntempe la kvanto de agrikulturaj produktoj daŭre superas la merkatan postulon por ili



La alko

Eühen HUCALO

Ĝi vekigis kaj streĉis la orelojn: en la humida ventoblovo aŭdiĝis seka akreta sono. La sono flugis de malsupro, de rivero. La alko levigis, nun ĝia staturo bone videblis en la antaŭmateniĝa krepusko. Ĝi estis granda besto kun vasta brusto, kiu apenaŭ levigis de la spirado. Ĝiaj kornoj similis aŭtunan malaltan arbuston, kiu jam perdis foliojn.

La alko sciis, ke tio estas krakado de malnova kverka branĉego, seka, senfolia; ĝi jam antaŭlonge devintus fali, sed ĝi ne falis, kun mirinda obstino alkröiĝinte al la arba trunko. Ĝi sciis tion, sed tutegale tio ĝin ne trankviligis, ia maltrankvilo en la sango, komence eta, apenaŭ sentebla, poiomete densiĝis, kaj pro tio ĝia felo sur la brusto foje ekstremis, poste ankoraŭfoje. Ventoblovo alportis odoron de la rivera glacio, en kiu vivis la sento de glaciĝinta marĉo, aŭdiĝis susurado de velkintaj tigoj, kiuj galope saltadis sur falintaj folioj, sed super ĉio ĉi sonis laca, simila al suspirado, knarado de branĉego.

Ĝi estis maljuna viralko, jam alcutimiĝinta al la rezervejo, en kiun ĝi trafis el tajgo, alcutimiĝis ĝi ankaŭ al homoj kaj al tio, ke oni ĝin kromnutras. Sed tiu eta krakado vekis interne ian nekularan timon, kiu memorigis la vivon en tajgo, memorigis danĝerojn, kiuj embuskis ĝin

tie, kaj la alko lasis sian dormolokon, ekmarŝis kaj poste ekkuris. Ju pli multe ĝi kuris, des pli vastiĝis la timsento, kaj malgraŭ ke ĝi aŭdis nenion krom obtuzan sonadon de siaj hufoj kontraŭ la tero, ĝi daŭre ne haltis. Arbustoj kaj arboj dejetis al ĝi bluetan prujnon, naztruoj ŝprucis en la aeron du maldikajn fluetojn de vaporo. La alko preterkuris pinarbaron, poste ravinon, kaj kiam ĝi trafis en fantome malfortan lumon, kiun elradiis trunkoj de betuloj, ĝi haltis kaj, levinte la kapon, provis percepti tiun bruon, kiu estingiĝis malantaŭ ĝi. Trankviliĝinte, ĝi eklekis la grundon, apenaŭ kovritan de neĝo, kaj poste direktis sin al sia plej ŝatata arbarkampeto.

Tiu arbarkampeto, plena je iom putraj ŝtipoj, ronde staris ĉe tremol-arbareto, iom sur monteto. Fruprintempe ĝi estis la unua, kiu kovriĝis per floroj, kaj ĉi tie rapide kreskis tiom alta herbaro, ke kuŝante en ĝi la alko povis duone sin kaŝi. Nun la arbarkampeto estis malplena, kiel ĉio ĉirkaŭe; la alko ekstaris senmove, atente fiksrigardante per siaj rondaj okuloj la arbarmuron antaŭ si, ĝuste tien, kie ĉiam okazas sunleviĝo. Iom post iom la alko trankviliĝis. Tiel ĝi staris dum ĉirkaŭe pli kaj pli heliĝis, pli klare videbliĝis tremoloj, la aero inter ili profundiĝis kaj diafaniĝis, kaj la silento, antaŭe streĉatente blinda, fariĝis trankvila kaj komprenata, en ĝi ne plu sentebliis la timo,

kiel antaŭe. La alko esperis ekvidi la sunleviĝon, kaj kiam pro ĝiaj radioj ekbronzis la arbopintoj, kiam la branĉetoj kvazaŭ ekbanis sin en ĝiaj ridetoj, la alko kvazaŭ malpeziĝis, fariĝis pli belstatura, kaj en la okuloj aperis orsimila brilo, pro kiu la okuloj tuj ekaspektis plenaj je kompreno de la natura vivo kaj ĝiaj sekretoj. Starante ankoraŭ iom pli, ĝi ekvidis la blanko-rozan diskon, kiu elnaĝis en la dezerton de vintra pura ĉielo, kaj svingis per la larĝabranĉaj kornoj, kvazaŭ salutante ĝin.

Tamen, kiam ĝi marŝis al rivero, subite denove ekaŭdiĝis malgaja knarado de branĉego, kaj la alko, kiu sukcesis jam forgesi pri tio, denove ekmaltrankviliĝis, denove streĉatentis, kaj liaj piedoj ekpreteis kuri ien for. Sed ĝi venkis sin kaj malsupreniĝis ne rapide, ĝi nur pli ofte kaj pli atente rigardis ĉirkaŭe. Same kiel antaŭe, la vento blovis ie el herbejo, ĝi estis penetrita de malvarmo kaj de la odoro de fojno, kiu estis stakita sur la dekstra bordo. La padeto estis apenaŭ piedpremita – oni ekuzis ĝin antaŭnelonge, kaj la alko ekflaris por ekscii, ĉu ne iris laŭ ĝi lupoj, aŭ vulpoj, aŭ homoj. Sed estis sur ĝi nur hieraŭaj spuroj de korniko kaj ie apude – kavetoj faritaj de leporaj piedetoj. Ĝi malsupreniĝis al la bordo. Aliflanke, tuj ĉe la horizonto, estis vilaĝo, super kiu griz-fumis domfornoj. Sur malproksiman monteton apenaŭ supreniĝis unuĉevala sledo, jen ĝi atingis la pinton – kaj tuj fornaĝis aliflanken...

Kiam la alko surpaŝis la glacieron, sub ĝi ekbruis io mallklara, kaj poste, kiam ĝi plusekvis al aperturo en glacio por trinki akvon, ĝi nur fojfoje iom kraketis. Randoj de la aperturo dise fajreris, kaj la akvo, kovrita de tremantaj pecetoj de glacio, similis al nemoviĝanta blua ŝaŭmo. Sentebliis kaŝita profundeco de la rivero, ĝia fluado, kiu eĉ sub glacio ne ĉesas. La alko skuis la kapon, flarante la aperturon, poste etendis la kolon, paŝis iom antaŭen, jen-jen preskaŭ tuŝante per la lipoj vitrosimilan bluan ŝaŭmon; liaj naztruoj ekstremis, antaŭsentante malvarman akvon, – kaj ĉi-momente la rivero sub ĝi ekkrakis. Per ĉiuj kvar piedoj ĝi penis elpuŝi sin, sed ĝiaj hufoj jam estis en la akvo, kaj la alko time eksentis, ke ĝi ĉiam pli kaj pli profundiĝas en la glaci-kaĉon. Ne unufoje ĝi konvulsie ekstremis per la tuta korpo, metante la tutan forton kaj senesperan reziston en tiujn provojn elsalti, sed ĝi profundiĝis pli kaj pli, kaj glacipecoj jam tuŝis ĝian dorson. Por momento ĝi trankviliĝis, preparante sin al nova provo elsalti, kaj kiam la antaŭaj piedoj ekflugis sur la glacieron, ŝajnis, ke ĝi jen-jen elsaltos kaj sin savos, sed la glacio denove rompiĝis sub la peza korpo, kaj la alko denove estis en la akvo ĝis la kolo. Ĝi ekmuĝis, petante pri helpo, kaj ĝiaj okuloj kovriĝis per sanga tristo, ili kvazaŭ brulis per ruĝa malespero. Ankoraŭfoje ĝi provis liberiĝi, sed ĝi sukcesis fari tion nur per unu piedo – la alia, frapinte la glacieron, fariĝis preskaŭ neregebla. La akvo en la aperturo sangokoloriĝis, kaj jam ruĝa fluis pluen laŭ fluejo, malaperante sub la glacio.

La alko eksentis, ke tiel ĝi ne sukcesos elŝiriĝi. Similan senton ĝi jam havis – ĝuste tiam, aŭtune, kiam en nigra pinarbaro, kiu eĉ ĝemis pro la vento, ĝin persekutis luparo. Jen-jen la lupoj povis ĝin kapti, ĝi eĉ sentis mortospiron kaj kuradis nur pro mekanika maleblo halti. Tiam ĝin savis ĉasistoj, kiuj venis el urbo kaj, sukcesinte nenion ĉasi, sidigis por vespermanĝi. Aŭdinte la persekutkuradon, ili permesis al la alko preterkuri kaj komencis senzorge pafadi la luparon... La rivera fluo aspektis ne samterure kiel la luparo, ĝi fluis ne tiom rapide, ne bruligis la alkon per sia mortospirado, sed ĝi estis same senkompata, kaj ju pli vastan aperturon ĝi faris, des pli rapide eblis trafi sub la glacieron. Komprenante tion, la alko strebis ĉion fari atente, sed la piedo doloris, la korpo malfortigis, kaj poiomete la fortoj lasis ĝin. La alko preparis sin al ankoraŭ unu decida elsalto, kaj post plia malsukceso ĝi iom trankviliĝis, ja ĝi sciis, ke tiu provo ne estas la lasta, ke ĝi provos kaj provos senĉese ĝis la spirado ĉesos.

Du knaboj eliris el la arbaro al la bordo kaj haltis. Ili venis por kolekti branĉlignaĵojn, kaj ilia trankvila ĉevalo restis ĉe la arbarrando, sed ili decidis rigardi al la rivero, ĉu jam rompiĝas tie la glacio, ĉu baldaŭ ĝi ekmoviĝos. Ambaŭ ili estis vastŝultraj, ambaŭ havis larĝajn simpatiajn vizaĝojn kaj ili tiel similis unu la alian, kiel malgranda **boleto** similas al sia pli granda najbaro. Ili ĉirkaŭrigardis la riveron, kaj iliaj vizaĝoj eĉ pli moliĝis pro tiu ĉirkaŭa vasteco, pro tiu malproksimeco, kiu daŭris eĉ de malantaŭ la alibordaj montetoj. Ne tuj ili rimarkis la aperturon, ĉar ĝi estis ne tiel rimarkebla, se la alko denove ne provus elsalti super la glacieron.

– Hundo sin banas, – diris pli juna frato. La pli aĝa eble eĉ ne rigardus tiufanken, sed li tuj ekpripensis, kia hundo povis trafi en tiun aperturon por bani sin?

– Kie? A-a... – li atente fiksrigardis, kaj liaj akraj okuloj rimarkis branĉovastajn kornojn. – Tio estas alko...

Ili ankoraŭ ne komprenis, kio okazis tie, kaj pro tio ankoraŭ iom da tempo staris sur la sama loko kaj cerbumis, kiel la alko povis trafi en la akvon. Sed kiam ĝi denove ekmoviĝis, kaj poste porlonge restis senmova, la boletoj komprenis, kio okazas al ĝi. La pli aĝa frato tuj ĵetis sin al la sledo por preni hakilon, kaj la pli juna malrapide

ekmoviĝis antaŭen, timante mem aliri al la alko pli frue ol venos la pli aĝa frato.

La alko jam tute senfortiĝis kaj indiferente rigardis, kiel alproksimiĝas la infanoj. Ĝi pli kaj pli profundiĝis en la akvon, kaj ĝiaj kornoj balanciĝis super la glacia miksaĵo, kvazaŭ nekutima arbusto. Sub tiu arbusto jam iom trankviliĝis la ruĝa malespero, sed ĝi estis nun tiom senlima, ke ne sufiĉis por ĝi la okuloj, kaj tiu malespero ŝprucis ĉiudirekten. Komence la infanoj ne sciis, kiel aliri la alkon kaj mem ne trafali. Sed la pli aĝa frato estis prudenta kaj kuraĝa, kaj la hakilo en liaj manoj ne dormetis. Li komencis haki la glacieron, farante vojon al la bordo, kaj la pli juna dancis ĉirkaŭ li; ne sciante, kiel helpi, li nur spiris kaj senpacience batis per manplatoj siajn flankojn kaj koksojn. La alko ne timis la homojn. Ĝi atentis ties laboron, kaj ĝia korpo fojfoje tremis, kvazaŭ ĝi tre frostis aŭ denove volis provi elsalti, sed la fortoj ĝin forlasis. Komence ĝi eble nenion komprenis pri la laboro, sed kiam la kanalo pli proksimiĝis al la bordo, ĝiaj okuloj ekbrilis per kompreno, kaj nun ĝi ne plu sin ĵetadis, sed nur trankvile atendis.

Enuante sola, el la arbaro venis ilia ruĝebruna ĉevalo, tirante la sledon, kaj iom-post-iom ekpaŝis al la rivero. Ĝi ekstaris je ioma distanco kaj, svingante la voston, atente rigardis. Poste ĝi iris iom antaŭen. La pli juna boleto minacis per la pugno kaj kriis:

– Ĉu ankaŭ ci volas trafali?!

Ambaŭ fratoj eĉ ne pensis, ke la printempa glacio estas perfida kaj ne atentis, ke ili estas savantoj.

La pli aĝa frato daŭrigis la hakadon, kiam la alko eksentis sub si malprofundecon kaj, obstine svinginte la kapon, elsaltis per la antaŭaj piedoj sur la glacieron, kaj poste ankaŭ per la malantaŭaj. Li eĉ ŝanceliĝis kaj disigis la piedojn – ŝajnis, ke ĝi tuj falos. Ambaŭ boletoj rigardis ĝin, ne kredante – jen kiel granda ĝi estas, kaj nun kiam ĝi elgrimpis, neniu el ili kredis, ke ĝi povis droni. Ili sendefende ridetis kaj volis aliri al ĝi pli proksimen, sed la infanoj ne kuraĝis tion fari.

La alko deĵetis de si akvon kaj glacipecetojn. Ĝi plenbruste suspiris kaj rigardis la infanojn. Liaj okuloj ankoraŭ estis ruĝaj pro la antaŭnelonga malespero. Poste la alko ekpaŝis, kaŭre metante la piedojn, kvazaŭ ĝi daŭre timis

la glacieron; la besto lamante eliris al la bordo, ankoraŭfoje rigardis reen al la rivero, kaptante per sia rigardo kaj arĝente farbitan herbokampon, kaj la infanojn, kiuj ankoraŭ kun miro rigardis ĝin, ne kredante, ke ili sukcesis helpi al tiu grandega besto, kaj tiam ĝi trankvile ekpaŝis al la arbaro. La ruĝebruna ĉevalo, nenion komprenante, observis ĝian foriron kaj movadis la orelojn.

Kiam eksonis pafo, la alko ankoraŭ iom kuris antaŭen, sed poste stumblis, kvazaŭ ĝi mispaŝus ŝtipon. La infanoj komence eĉ ne atentis tiun pafon, sed kiam la alko falis surneĝen, ili komprenis, kiun oni celis. Ili ĉirkaŭrigardis, strebante ekvidi la ĉasiston, sed ne sukcesis kaj, enspirinte maldolĉan aeron, plenforte ekkuris tien, kie kuŝis la alko. Ambaŭ ili pensis, ke antaŭ ol ili atingos tiun lokon, la alko levigis kaj denove nerapidante ekpaŝos al la arbaro, ke ne estis la pafo, – sed la alko ne ekstaris. Ĝi kuŝis surflanke, dismetinte la kruojn, kaj nun ŝajnis eĉ pli granda. Simple ne eblis kredi, ke tiom grandan beston oni povas faligi per pafo, same kiel antaŭe ne eblis kredi, ke ĝi povas droni. Sur ĝia felo ankoraŭ estis rivera akvo, sur la harojn algluiĝis neĝo, kaj la brusto ne moviĝis pro la kuro kaj eĉ ne vaporis. La kapo kuŝis tiel, kvazaŭ la alko aŭskultus la teron, ĉu proksimas la printempo, ĉu ĝi baldaŭ venos, kaj la kornoj kreskis tuj ĉe la neĝo, kvazaŭ magia arbusto.

Ili eĉ ne rimarkis, kiam al ili venis ilia onklo Ŝpiĉak. Rondaspekta kun ruĝeta, bone elbakita vizaĝo, en ofte uzataj altaj botoj, en kiuj li estis preskaŭ ĝiszone, la onklo haltis apud la infanoj. Eble ankaŭ li estis mirigita, ke tiu grandega besto kuŝas surtere. La onklo tenis pafilon en la manoj, sed tiel, kvazaŭ li emus sin defendi de iu. Sur liaj lipoj videblis iu blankaĵo – eble pro iu neatendita rapida sento.

– Ha? – reeĥis la onklo. – Nu jen kiel?

Ĝojo sur lia vizaĝo konkuris kun atentostreĉo, kaj ĝi trembrilis jen per helaj, jen per nigraj ekflamoj.

La infanoj diris nenion – ili neniel povis rigardi aliloken ol al la alko, kiu ne moviĝis eĉ unu fojon, malgraŭ iliaj atendoj.

– U-uh, – elblovis Ŝpiĉak, ĉirkaŭirante la mortpafitan beston, kaj per botpinto puŝis inter ties kornojn.



Sed la infanoj ankoraŭ ne kredis, ke la alko estas morta, kaj pro tio atente rigardis la beston por ne preterlasi la momenton, kiam ĝi ekmoviĝos por leviĝi.

– Ĝi estas el la rezervejo, – finfine diris la pli juna boletoj.

– La rezervejo estas malproksime de tie ĉi, – respondis la onklo. –

Alkoj ĉi tien ne venas el la rezervejo.

– Ĝi estas el la rezervejo, – denove ripetis la pli juna. La onklo ekkolersis.

– Nu kaj kio? Tio ne estas via afero.

– Ni savis ĝin de drono, – diris la pli aĝa frato kaj malamike rigardis la sunbruligitan vizaĝon.

– O-o, ĝi tutegale dronus! Ĉu ĝi preskaŭ dronis? Ĉu preskaŭ dronis? Diru do, ke ĝi dronis, kaj vi sukcesis ĝin eltiri jam nekvantan.

– Ni savis ĝin, – denove ripetis la pli aĝa frato, kaj lia vizaĝo fariĝis tiom ruĝa, kvazaŭ el ĝi tuj povus ŝpruci la sango.

– Tuj eksilentu, – pli kolersis la onklo, – alie mi vin punos, ankaŭ via patro punos vin! Se vi estos pli saĝaj, ankaŭ vi havos iom da viando, mi ne estos avara.

La pli juna frato turnis sin, kaŝante ploron. La pli aĝa prenis lian manon kaj, ne dirante eĉ vorton, kondukis lin al la sledo.

– Ankaŭ kornojn mi al vi fordonos, – kriis al ili la onklo. Ili eĉ ne rigardis lin, nur pli rapide ekpaŝis.

– La kornojn mi al vi donos! – denove kriis la onklo.

Kiam la fratoj frapis sian ruĝebrunan ĉevalon, la onklon kvazaŭ io ŝiris. Komence li malrapide faris la unuan paŝon, la duan kaj poste kuris por atingi ilin.

– La kornojn fordonos! – kriis li glutsufokigante, kvazaŭ ili ne aŭdis lin.

Ŝpiĉak delonge atente observis tiun alkon, li rimarkis ĝin samtempe kun la infanoj, kaj kaurante en kaveto, nur ridetis, kiam ili komencis savi ĝin el la aperturo. Li ne kredis, ke la knaboj sukcesos, sed opiniis, ke la alko tamen plene senfortiĝos kaj ĉu baldaŭ aŭ ĉu poste, ĝi trafos sub la glacieron. Sed evidentiĝis, ke la alko estis forta kaj vivema, kaj la infanoj estis obstinaj kaj persistaj... Nun necesas pensi pri tio, kiel ĝin kaŝi, kaŝi ankaŭ la spurojn de la kontraŭleĝa ĉasado, ja la infanoj ekveturis al la rezervejo por informi la gardistojn – pri tio li ne dubis. Sed kien ĝin kaŝi? Ja ne eblas ĝin tiri reen al la rivero kaj dronigi en la aperturo – tio malproksimas, do ne eblas. Se li povus tion fari, li eĉ momenton ne hezitus. Nun li rigardis al la besto kaj volis esperi, ke ĝi reviviĝos. Same kiel antaŭnelonge faris la infanoj, li nun volis, ke la alko levu la kapon, leviĝu sur la fortajn kruojn kaj ne rapidante ekkuru al la arbaro, same kiel ĝi faris antaŭnelonge, ĝis kiam ĝi renkontiĝis kun la kuglo.

Sed la alko eĉ ne moviĝis. Per sia grandega korpo ĝi kuŝis sur la tero, kvazaŭ aŭskultante, ĉu baldaŭas la printempo kun verdaĵo, kaj ĝiaj kornoj elstaris super la neĝo kiel vasta arbusto, kiu eble same atendis la printempon por reekverdi, sed tion ĝi sukcesos fari nek nun, nek estontece.

Blovis vento, levante blankan polvon, balancante sekan tigaron, sed la kornoj eĉ ne moviĝis.

boleto – speco de fungo

Tradukis Dmitrij CIBULEVSKIJ

Kontrolis kaj korektis Julij LUPICKIJ kaj Ĵenja AMIS

Kotiztabelo de UEA por 2006

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	95	57	34	190
Aŭstrio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Belgio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Brazilo/eŭro	4	11	28	17	10	56
Britio/pundo	6	15	38	24	14	76
Bulgario/eŭro	4	11	28	17	10	56
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	65	165	415	265	160	830
Estonio/eŭro	5	12	30	19	11	60
Finnlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Francio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Germanio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Greklando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Hispanio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Hungario/forinto	1500	3700	9200	5800	3500	18400
Irlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Islando/eŭro	9	22	56	34	20	112
Israelo/eŭro	7	18	44	26	16	88
Italio/eŭro	9	22	56	36	22	112
Japanio/eno	1200	3000	7500	4500	2700	15000
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	15	38	24	14	76
Nederlando/eŭro	9	22	56	36	22	112
Norvegio/krono	75	185	460	275	165	920
Nov-Zelando/dolaro	17	44	109	65	39	218
Pollando/zloto	20	50	120	75	45	240
Portugalo/eŭro	9	22	56	36	22	112
Rusio/eŭro	4	11	28	17	10	56
Slovakio/krono	200	550	1400	900	550	2800
Svedio/krono	80	210	520	330	200	1040
Svislando/franko	14	34	86	52	31	172
Usono/dolaro	10	25	63	38	23	126
TARIFO A/eŭro	6	15	38	23	14	76
TARIFO B/eŭro	4	11	28	17	10	56

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Latvio, Litovio kaj Slovenio laŭ Estonio.

TARIFO A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MALLONGIGOJ:

MG – Membro kun Gvidlibro

MJ – Membro kun Jarlibro

MJ-T – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*)

MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon *KONTAKTO* kaj la bultenon *TEJO tutmonde*)

SA – Simpla abono de revuo *Esperanto* sen membreco

Kto – Simpla abono de revuo *KONTAKTO*

SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldona al membrokotizo)

PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas *KONTAKTO* kaj *TEJO Tutmonde*)

DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)

DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oble de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)

Kiel individuaj membroj de TEJO (MJ-T aŭ MA-T) por 2006 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2006 (t. e. kiuj naskiĝis en 1976 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.

Eblas abonon ankaŭ al *TEJO tutmonde* sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la concerna lando.

Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro)

sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;

– havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;

– rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĝoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi

ne nur subtenas la esperantistan junularon;

de TEJO vi ankaŭ ricevas:

– revuon *KONTAKTO*

– bultenon *TEJO Tutmonde* (oficiala organo de TEJO)

– akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso

– aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

Jenja Amis, Ukrainio/Usono

Ĉu vi scias, kie estas la plej granda akvario en la mondo? Ekde novembro 2005 ĝi estas en Atlanto (Georgio), Usono. Ver-ŝajne, post la Olimpikaj Ludoj 1996, Atlanto fam-iĝ-is danke al tiu ĉi grandega akvario. En la pli ol kvar milionoj da litroj de sala kaj nesala akvo loĝas pli ol 100 mil bestoj de 500 specioj el la tuta mondo. Por fari la "maron" oni uzis tre bone pur-ig-itan ordinaran akvon kaj 0,7 milionojn da kilogramoj da salo! La tuta kosto de la akvario superis 200 milionojn da usonaj dolaroj.

Mi vizitis la akvarion kun la familio ĉi-vintre, kaj vere, neniuj televidaj raportoj povas anstataŭi la "vivan" viziton! La akvario estas farita en la formo de grandega ŝipo kaj troviĝas nur kelkajn minutojn piede de la Olimpika Parko. Post ioma atendado – estis sabato, kaj homoj multis – ni eniris la ejon. Tuj ĉe la enirejo troviĝis akvujo kun **rajoj** kaj aliaj fiŝoj, kiujn eĉ eblas tuŝi! La akvujo "fermiĝas" por tuŝoj ĉiujn 15-20 minutojn – pro la ĉiama tuŝado la akvo malpurigigas, kaj oni devas tre ofte ŝanĝi ĝin.

Unue ni iris al la Malvarm-akva Serĉo – tiel nomiĝas la parto de la akvario, kie loĝas malvarm-akvaj bestoj. La plej famaj ĝiaj loĝantoj estas blankaj **balenoj**. Kiam mi alproksimiĝis al tiuj grandaj kaj inteligentaj bestoj, mi estis mir-ig-ita de ilia beleco. Ili malrapide moviĝis jen kapon suben, jen kapon supren, jen rekte al la homoj... Mi certis, ke ili observis homojn kaj ridetis al ili. La homoj ridetis

Fari... la maron!



responde. La ejo, kie loĝas la balenoj, estis granda – sed ĉu sufiĉe granda por tiaj grandegaj bestoj?.. Tion mi demandis al laboristino de la akvario. Laŭ ŝi, la ejo estas sufiĉe granda kaj sekvas la rekomendojn de la plej bonaj mar-sciencistoj. Malantaŭ tiu ĉi ejo troviĝas alia, kiun homoj ne povas vidi. Tie la bestoj povas kaŝiĝi, kiam ili volas esti solaj.

Kvankam mi tute kontraŭas tenadon de tiaj bestoj en mallibero, bon-ŝance, ĉi-foje oni ne kaptis balenojn por la georgia akvario. Oni aĉetis ilin de aliaj, malpli bonaj lokoj. Ekzemple, Nico kaj

Gasper venis al Atlanto de lud-parko en Meksik-urbo. Pro tute nesufiĉa grandeco de la ejo, malpura akvo, malbonaj manĝaĵoj kaj ĉiamaj **kriegoj** de la "ludantoj", la bestoj ekhavis seroizajn malsanojn...

Post la "malvarmaj akvoj", ni iris al pli varma loko – al la Oceana Vojaĝanto. Tiel nomiĝas la plej granda ejo en la tuta akvario. En la mezo de la Vojaĝanto troviĝas trairejo, kaj oni do povas vidi la fiŝojn ne nur de unu flanko, sed de ĉiuj flankoj, kaj ankaŭ de sube. En la Oceana Vojaĝanto, inter aliaj fiŝoj, loĝas du balen-**ŝarkoj** Ralph kaj Norton. Fakte, ili estas ŝarkoj, ne balenoj. Balen-ŝarko nomiĝas tiel, ĉar ĝi estas vere grandega – ĝi ja estas la plej granda fiŝo en la mondo kaj povas kreski ĝis 12 metroj! Same kiel balenoj, balen-ŝarkoj ne povas manĝi grandajn manĝaĵojn kaj do ili ne manĝas homojn. Ralph kaj Norton venis al Atlanto el Tajvano. Oni veturigis ilin per speciala aviadilo, kaj la vojaĝo daŭris 60 horojn.

Fakte, la georgia akvario estas la sola akvario ekster Azio, kiu havas balen-ŝarkojn.

La lasta parto de nia vizito estis la Varm-akva **Plonĝejo**, kun multegaj diverskoloraj belaj fiŝoj, **meduzoj** kaj vivantaj **koraloj**. Koraloj estas tre sentemaj al la ŝanĝo de temperaturo, kaj en multaj partoj de la mondo ili for-mortas pro la Ter-varmiĝo... Mi ege esperas, ke neniam venos la tempo, kiam ni povos vidi vivajn koralojn kaj aliajn marajn loĝantojn nur en akvario!

akvario – akvujo por teni fiŝojn kaj aliajn akvajn bestojn; ĉi tie: ejo kun pluraj akvujoj kaj akvujejoj
baleno – la plej granda mara besto; blanka baleno – **specio** de baleno, de la nordo, ne tre granda (maldekstre)

koralo – arb-simila mara vivaĵo, kiun formas multaj tre etaj estaĵoj
krii – el-direkti, el-igi sonojn

meduzo – tra-videbla mara estaĵo, kiu libere trans-lok-igigas en la akvo
parko – malferma ejo kun verdajoj, ludejoj kaj tiel plu

plonĝi – plen-korpe eniri akvon
rajo – speco de fiŝo (vd. bildon supre)

specio – baza unuo de bestoj, plantoj ktp., kiuj tre similas inter si kaj povas naski idojn

ŝarko – la plej granda fiŝo

INTERRETO

